

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Beletra vagado
en Berlino**



**Kalendaro
1999**



**Informado: Ĉu
saman frazon
tutmonde?**



Ameriko: Idealisme supren

Vi trovos...

41 Malferme

En 80 numeroj ĉirkaŭ la mondo

István Ertl

42 KOLOSA TASKO EN TRI AMERIKOJ

Bill Maxey

"Pro la rolo kiun ludas idealismo en landoj kun multaj gejunuloj, Ameriko sendube multon povos kontribui al la E-movado en la tria jarmilo."



Kvira Tui-Amerika Kongreso de Esperanto

46 Informado

Por unu frazo tutmonda

Edmond Ludwig

De entombigo al Esperanto-eksporto

Parfo Ajto



Kongreso de Parfo Ajto

48 Internaciaj Ekzamenoj KSM: Ree normala ritmo

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

49 KALENDARO

53 REAGOJ

54 Libroservo

Vigla vendado maltrankviliga

Osmo Buller

55 LASTE APERIS



Kvazaŭ ĝisgrunde bombardita

Péter Pál Denke

Kaj plue...

56 Influe

58 Persone Oficiala Informilo

59 Anoncetoj

60 Forpasoj

La kovrilo: Bromelio floras, grimpanto alsupras en montoj Suesca, Kolombio.

Dekstra paĝo: Lacerto sunumas en Igvazuo - Argentino/Brazilo. (F. L. Veuthey)



© Sammlung Eickemeyer/Berlin

45 Nia kongresurbo

Laŭ la (fer)vojoj de Varankin kaj Schwartz

Paul Gubbins

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establiĝis kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.



EN 80 NUMEROJ ĈIRKAŬ LA MONDO

Hazarde mi rimarkis ke la nuna numero de *Esperanto* estas la okdeka kiun mi redaktas. Estas sciate ke por gepatroj la tempo pasas pli rapide de post la naskiĝo de iliaj infanoj; pri redaktoroj estas iom simile.

Nu, miaj animstatoj devas esti sufiĉe indiferentaj por la legantoj. Estus ja malbone se ili peze suspirus: "Hove, jam la okdeka el la manoj de Ertl!" Sed mi ne povas rezisti mension de ĉi tiu individua jubileeto, iom post la 75-a kaj signife antaŭ la 100-a numero: mia pasio por la Esperantema verkisto Jules Verne klariguitan ŝaton por la numero 80.

Pli ol sep jaroj da ĉiutaga kontakto kun la Esperanta realo faligas min de surprizo en surprizon: malgraŭ rekoneblaj skemoj, antaŭvidebloj kaj tipaj ecoj, la esperantistaro ilustras kaj ekzemplas la heterogenon de nia infana raso. Esperanto estas vivata, sentata kaj kreata malsame en diversaj landoj. En ĝi apudas unu la alian pragmatuloj kaj idealistoj, lingvemuloj kaj plifeliĉigantoj, ĝisostuloj kaj dikhaŭtuloj, "ĉiampravuloj, / pioniroj, / kundrivantoj kaj / multaj aliaj homoj — / kiuj simple tie loĝas" (Heinz Kahlau).

Homoj logiĝas kaj ligiĝas al Esperanto pro plej diversaj kialoj, kaj komence apenaŭ imagas kion tiu lingvo, unika laŭ origino kaj funkci-maniero, efektive donos al ili. Sed finvojaĝinte la longajn, ofte nefacilajn etapojn de la enmovadiĝa itinero, ili neeviteble

demandas al si kion do signifas atingi tiun provizoran celon; ili ekserĉas sian esperantistan identon, pro la prema neceso prikonscii al kio ili fordonadas parton, finfine tre signifan, de sia unusola vivo.

Jen kial eterne floras — kaj floru! — en nia gazetaro debatoj pri farendoj kaj farindoj. Jen kial eĉ kongres-temoj unuavide sterilaj akiras neatenditan intereson pro siaj ligoj kun la demandoj pri nia identeco. (Elstare tielas la ĉi-jara temo, tutmondiĝo.) La fakto ke ekaparteno al nia komunumo estas propravola — plejparte nedenaska, ĉiam ĉesigebla —, implicas ĉe ĉiu ĝia ano malsamajn aliĝmotivojn kaj celvortumojn. Tial nia movado, kies fortojn grandparte okupas la propra rekreado, ne povas ne koncentri multon el sia restanta energio al la konstanta serĉado de konsento en la vojdifinado.

Kaj, tamen, ĝi estas rekta, la voj' elektita. Ekzistas homoj ekster Esperantujo, kaj eĉ en ĝi, laŭ kiuj eksmodas movado kiu, laŭ ili, forlasis siajn homfratigajn idealojn kaj pravigas sian ekziston per motivoj ne plu tuthomaraj, sed partismaj, ĉu science interlingvistikaj, ĉu kulture raŭmismaj, aŭ politike eŭropemaj. Sed estas tute male. Niaj idealoj aktualas pli ol iam ajn. Ĉar ĝuste nun, kiam "lingvaj rajtoj" kaj "lingva demokratio" iĝas ĉiam pli parto de la publika parolo, estas pli kaj pli agrable aparteni al ni, al la idealistoj.

István Ertl



Kolosa tasko en tri A

Bill Maxey - Usono

Tragedia tertremo neniel malhelpis la inaŭguron de la Kvara Tut-Amerika Kongreso de Esperanto.

La ĉefa okazejo de la 4-a TAKE (Bogoto, Kolombio, 28 jan. – 3 feb.) estis la nacia biblioteko, kie ĉirkaŭ 40 ĉeestantoj aŭskultis la nacia himnon kaj “La Espero” en la solena malfermo. (Laŭ la finaj ciferoj, 76 homoj aliĝis kaj 63 partoprenis, el 12 landoj amerikaj kaj eŭropaj.) La sekretario de LKK, Santiago Álvarez, prezentis la kolombian ministron pri kulturo, d-ro Alberto Casas Sanz de Santamaría, kiu kuraĝigis la kongresanojn per solidarecaj vortoj.

Prof. Luis Jorge Santos Morales (Kolombio), alta konsilanto al la LKK, laŭtlegis salutmesaĝojn de i.a. la E-asocioj de Kostariko, Usono kaj Kebekio, kaj de Renato Corsetti, vicprezidanto de UEA, kiu proponis helpon, pere de Konto Espero, al esperantistoj trafitaĵ de la tertremo (vd. sube).



La partoprenantaro.

Supre: Salutas la muzikisto Horacio Hernández per sia E-gitaro.

Kvazaŭ ĝisgrunde bombardita

Péter Pál Denke - Hungario

Eŭropa esperantisto, UEA-delegito pri medicino, troviĝis dum sia kolombia vojaĝo en la regiono kiun trafis la tertremo.

Post tre agrablaj spertoj pri belegaj pejzaĝoj kaj amikaj interhomaj rilatoj dum miaj antaŭaj vojaĝoj al Latinameriko (1985, 1996), mi insistis denove veturi al tiu mondparto, malgraŭ timigaj novaĵoj pri kruelaĵoj, ofte aŭdeblaj el Kolombio. La 4-a TAKE, la fakto ke mi havas jam de 15 jaroj korespond-amikon en Kolombio, la entuziasmo kun kiu la loka esperantistaro renkontas malproksimumojn: ĉio ĉi decidigis min al nova vojaĝo.



La urbo Armenia post la tertremo

Antaŭ la kongreso mi flugis al la urbo Armenia (ĉ. 300 mil loĝantoj,

400 km de Bogoto) por viziti mian leteramikon Antonio José Alzate. Li atendis min ĉe la flughaveno kun siaj familianoj. Dum la sama tago, dimanĉe post la tagmanĝo, ni aŭte vizitis la pitoreskajn ĉirkaŭaĵojn de la urbo, kiu situas en la provinco Quindio, nomata “Kafregiono de Kolombio”.

Lunde matene Antonio veturigis min por vidi la urbon Cali kaj viziti tie Rubén Torres. Tre belajn kelkajn horojn ni restis kun esperantistino, kaj jam de ŝi ni aŭdis ke okazis tertremo en la urbo Pereira, proksime al Armenia. Post kelkaj horoj ni aŭdis en vendejo saman novaĵon pri Armenia, sed sen detaloj. Do, ni ne taksis la aferon tre grava. Ni frue forlasis Cali por veturi al la urbeto Roldanillo (ĉ. 100 km de Armenia), en kies universitato Antonio, ekonomikisto, devus prelegi vespere. Sed

➔ p. 44

Amerikoj



»
De maldekstre:
Rodrigo Ramírez,
Luis J. Santos,
d-ro Alberto Casas
(ministro pri kulturo)
kaj Santiago Álvarez.

Post paŭzo por kafo — aparte ĝuinda en Kolombio — trafa sesio gvidata de Santos celis “repreni la fadenon” de la tri antaŭaj tut-amerikaj kongresoj (Marília, Brazilo, 1978; San Luis, Argentino, 1981; San José, Kostariko, 1996). Komentinte iliajn konkludajn rekomendojn, oni vigle diskutis pri aktualaj projektoj kaj pri la loko de la sekva kongreso. (En posta sesio, membroj de la Komisiono pri amerika agado rekomendis akcepti inviton de Leonora Torres al Meksiko en 2001.)

Sukceso pro malfermeco

Vendredo, la 29-a, komenciĝis per diskutrondo gvidata de prof. Santos pri la kongresa temo, “Perspektivoj de Esperanto por la tria jarmilo”. Kelkaj el ĉi ties aspektoj reaperadis poste en la kongreso, ekz. ke la granda sukceso de Esperanto en Brazilo ŝuldiĝas ne nur al la forta spiritisma influo sed ankaŭ al la ĝenerala malfermeco de la brazilanoj al novaj aferoj. Ĉiuj konsentis ke tiu trajto ĝenerale mankas al niaj ceteraj landoj, kie “unuopulemo” regas. Pensigis la ideo de Santos ke pro la rolo kiun ludas idealismo en landoj kun multaj gejunuloj, Ameriko sendube multon povos kontribui al la E-movado en la tria jarmilo.

Juan E. Bachrich (Venezuelo) prezentis superrigardon de la hodiaŭa E-movado, kun aparta atento al la grava historia kaj aktuala rolo de UEA.

Santiago Álvarez prelegis pri homaj rajtoj en la tria

jarmilo. Konstatinte ke nia kruela jarcento ignoris la pledojn kaj konsilojn de d-ro Zamenhof, li kerne proponis ke ni rekomendu al edukaj instancoj instruigi Esperanton kadre de programo pri homaj rajtoj. Iu atentigis ĉi-rilate pri la jam planata lerneja programo Interkulturo. (Vd. jun. '98, p. 118.)

Mallongan prezenton de Kampanjo 2000 gvidis d-ro Rodrigo Ramírez (Kolombio) kaj Symilde Ledon (Brazilo), kiu skizis la kelkjaran evoluigon de la fina kampanja dokumento kaj rakontis kiel en Brazilo oni laŭgrade konsciigis pri la ideo kaj definitive alprenis ĝin.

La kongresanoj tre varme akceptis la indiĝenan ŝamanon Juan Bautista, estron de pli ol 100 etnoj en Kolombio, Ekvadoro kaj Venezuelo. Sidante en siaj ritaj vestoj, li prezentis — per traduko de Philippe Chavignon (Francio) — la bazan kredaron de sia popolo. Poste, helpe de sankta juvelŝtono, li demonstris sian koncentrig-kapablon. Chavignon klarigis ke la ŝamano interesiĝas pri Esperanto pro la frapa lingva problemo interne de sia regno.



Kiel helpi en Mezameriko?

Sabate, la 30-an, Bill Maxey (Usono) estris diskutrondon pri “Amerika E-agado en la nuntempo”. Li koncentris sian atenton al Mezameriko, pro siaj tri lastatempaj vojaĝoj tie. Laŭ lia resumo, Kostariko havas la plej viglan movadon; en Honduraso, Belizo kaj Panamo spuroj de Esperanto apenaŭ troveblas; Salvadoro, Nikaragvo kaj Gvatemalo spertas apartajn problemojn meze de grandaj ebloj. Kiel helpi tie la homojn lerni kaj informiĝi? Venis diversaj respondoj, i.a.: ni sendu al ili la libron *La fenomeno Esperanto* de Auld en hispana traduko, kuraĝigu ilin per bildkartoj kaj, kiam eble, nepre vizitu ilin. Kriterioj por la uzo de la limigitaj rimedoj tamen ne estis starigitaj. ☞

Ligo kolombia revigliĝas

En kunsido post la kongreso, kolombiaj esperantistoj decidis “doni duan akuŝon” al la landa asocio de UEA, Kolombia E-Ligo. La sidejo de KEL estos en Cali. La provizoran estraron gvidas prezidanto Rubén Torres, vicprezidas Consuelo Polanco. (Laŭ R. Torres, B. Maxey; <http://esperanto-kolombio.org/>)



Ĉi-tage en alia urboparto hispanlingva prelego pri Esperanto allogis preskaŭ 70 homojn kaj vendigis 30 lernolibrojn kaj kasedojn.

En dimanĉo, la 31-a, post ekumena rondo zorge de Peter Preminger, pri scienca kaj teknika terminologio referis Luis Guillermo Restrepo Rivas. Li asertis ke ĝuste en tiu ĉi kompla kampo necesas sukceso, se Esperanto estu akceptata.

Progreso en "Aktiv-Ameriko"

Rubén Torres starigis diskutrondon pri pli efika rolo de amerikaj e-istoj en movado kiu ofte aspektas al ili iom fora. Evidentiĝis ke progreso ja estas konstatebla, aparte pro publikaj kunvenoj ĉe la UK-oj, vojaĝigo de junaj amerikaj aktivuloj (vd. jan., p. 7), ĝemelaj rilatoj inter po kvar amerikaj kaj eŭropaj societoj aŭ kluboj*, kaj ĵusa aperigo de nova informilo, *AktivAmeriko*. Aliflanke, la amerika movado suferas malbonan interkomunikadon. Tial — konsentis

* Kultura E-Centro (Campinas, Brazilo) kaj E-Societo de Glasgovo (Skotlando); Kuba kaj Germana E-Asocioj; E-Klubo de Santiago (Kubo) kaj Triesta E-Asocio (Italio); E-Klubo de Sancti Spiritus (Kubo) kaj La Verda Stelo (Antverpeno, Belgio)

la diskutantoj — oni strebu pli efike organizi la landajn asociojn kaj kunligi aktivulojn tutkontinente.

La 1-an de februaro, lunde, alvenis salutletero de la kolombia prezidento, Andrés Pastrana.

Post mardo dediĉita al ekskursoj, la lasta kongrestago (3 feb.) komenciĝis per la ĝojiga konstato ke Juan Ramón Rodríguez el Kubo, post grandaj malfacilaĵoj, finfine alvenis Bogoton. En prelego li pentris tre klaran bildon pri la kuba movado, ankoraŭ forta malgraŭ lastatempaj ekonomiaj malhelpoj. Li taksis ke troviĝas aktivuloj en ĉiu provinco, entute ĉ. 850. Fine li invitis, nome de Kuba E-Asocio, okazigi la 6-an TAKE (iam post 2001) en Havano.

Imitinda tradicio dediĉa

Ĉiu kongrestago estis dediĉita al la memoro de kolombia aktivulo: Joaquín Ospina, Jesús A. Vélez Rojas, Otto de Greiff, Gonzalo González, Luis E. Palacios Toral. La unua tago omaĝis al eksprezidento de Kolombio, Carlos E. Restrepo, kiu en la 20-aj jaroj, kolombia ambasadoro ĉe Ligo de Nacioj en Ĝenevo, konatiĝis kun Edmond Privat, kaj estis inter la proponantoj de rezolucio rilate Esperanton.

La nura pura lingvo

Philippe Chavignon prelegis pri la taoisma komunumo en Kolombio, kies majstro, Kelium Zeus, opinias Esperanton "la ununura pura lingvo sur la tero". La pli ol 100 mil latinamerikaj sek-

vantoj de la majstro estas do grava publiko por Esperanto.

En la solena fermo prof. Santos legis dekpunktan rezolucion, laŭ kiu i.a. "ni, [la partoprenantoj]... ĉesos demandi al ni kion UEA faros por ni, kaj ekde nun demandas al ni kion ni mem faru por sukcese kunhelpi kun UEA en la kolosa tasko disvastigi nian lingvon tra la tri Amerikoj: Norda, Meza kaj Suda."

★

→ Kvazaŭ ĝisgrunde bombardita (daŭrigo)

antaŭ ol iri al la prelegejo, ni vizitis la centron de la urbeto, kaj en drinkejo ni televidis ĵusajn informojn pri katastrofa tertremo en Armenio. Ni vidis bildojn elare filmitajn pri kvartalo kvazaŭ ĝisgrunde bombardita, kun domoj komplete detruitaj. Subite ni ege nervozigis, ekvarmegiĝis kaj decidis tuj reveturi. Maltrankvilaj ni proksimiĝis al la urbo, sen antaŭscio kio atendos nin tie, ĉu vivas aŭ pereis la familianoj de Antonio.

Ni alvenis en malhelan, senelektran, kvazaŭ postmilitan urbon. Komence

Espero helpas

Konto Espero finance helpas almenaŭ tri samideanojn en la tertreme trafita regiono de Kolombio rekonstrui sian domon. Ankaŭ aktivuloj en Nikaragvo, plagitaj de uragano Mitch, povas kalkuli pri tia helpo.

ni vidis kelkajn domojn kolapsintajn, dum la stratojn kovris ruinoj kaj falaĵoj pli kaj pli vaste; fine en la centro de la tertremo preskaŭ ĉiu domo, ĉiu muro estis falinta. La homoj, ŝokitaj pro la okazaĵo, apatie sidis inter la ruinoj, lumigis iomete per improvizaj fajroj. Vere mistera vidaĵo: sur stratoj iamaj, en lumo de fajro, laŭvicis homoj inter la restintaĵoj.

Tre malfacile ni povis veturi tra la centro, ĉar pluraj stratoj tute ŝtopiĝis pro la falaĵoj. Preskaŭ mirakle ni tamen alvenis al la loko de la domo de Antonio. Ĝi ja same tute falis. Lia fratino kuŝis sur la strato, sur matraco; la patrino estis jam en alia urboparto ĉe amikoj. Konstatinte ke la fratino transporteblas, ni veturis kun ŝi kaj poste kun la patrino al hospitalo, por la necesaj ekzamenoj pri la vundoj. Bonŝance, en la kvartalo de la hospitalo la tertremo ne multe damaĝis, ankaŭ ne mankis elektra lumo. Antonio demandis ĉu mi helpu en la malsanulejo, sed al ili necesus ĥirurgoj kaj ortopediistoj,

dum mi estas internisto. Feliĉe, neniu el la vunditoj bezonis enhospitaliĝon, ni do veturis je la dua nokte al najbara urbeto, Quimbaja, por tranokti ĉe parencoj. Ili tre ekĝojis ke ĉiuj vivas. Poste ankoraŭ tre pluvegis dum ĉ. duonhoru, kiu eĉ pli suferigis la viktimojn surstrate en Armenio.

Frumatene ni reveturis al la domo kun aliaj du viraj helpantoj el la familio kaj, kiel ĉiuj transvivintoj de la tragedio, ni komencis serĉi la saveblajn valoraĵojn sub la ruinoj. Per la aŭtomobilo ni forportis unue la librojn kaj teknikaĵojn, kaj vespere ni luis kamionon por transporti la meblojn — pli damaĝitajn —, la fridujon kaj fornon al la urbeto Calarca, al onklinno, kies domo ne suferis damaĝon, malgraŭ ke en Calarca mortis plurdek homoj.

La sekvan tagon ni veturis renkonte al Rubén, per kies aŭto mi atingis Bogoton — per ĉirkaŭvojo, ĉar la rekta ŝoseo estis en multaj lokoj blokita de terfalaĵoj pro la tertremo.

Laŭ la (fer)vojoj de Varankin kaj Schwartz

Paul Gubbins - Britio

En pluraj numeroj ni gvidos vin tra nia kongresurbo, Berlino. Via unua rendevuo estas literatura, ĉar Berlino ofte kulisas, eĉ ĉefrolas, en Esperantaj beletraĵoj.



Berlin. Bahnhof Friedrichstraße

Kie precize sub Berlino, en junio 1928, oni konstruis metropolitenon, ne estas indikite en la samnoma romano de Vladimir Varankin. Nur historiisto pri subteraj fervojoj, kun aliro al koncernaj arĥivoj, povus identigi la lokon kie inĝeniero Berg konstruis metropolitenon en Berlino: “Simile al ĥirurgo, oni tranĉis ĝian ventron kaj elprenas la internaĵon.”¹

Tamen literatur-amantoj ĉi-jare en Berlino ne seniluziĝu. Eĉ se ne eblos pilgrimi al Varankina tunelo omaĝe al la aŭtoro de *Metropoliten* — verko kiun W. Auld taksas “grava testamento, kiun ni dece ŝatu”² — ja eblos ekskursi per metropoliten (salutante la memoron de Varankin) al alia literatura sanktejo. Denove temas pri metropolitena referenco en “tre aminda

verko kaj ekscitanta ĝis la lasta paĝo”³ (P. Thorsen): *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz. Ĉi-foje la fervojo ne sub-, sed superteras, kio en 1928 jam fariĝis arĥaismo. Laŭ *Metropoliten*: “Oni ne plu konstruas la superterajn vojojn en Berlino. Ili estas maloportunaj, ĝenigas la stratan trafikon, multe bruas” (p. 44). La bruoj de la altfervoj (Hochbahn) ne tro ĝenis

eltrajniĝinte ĉe Nollendorf-placo, paŝi laŭ Bülow-strato kaj stari antaŭ n-ro 102. Kaj, dum kelkaj momentoj, revii.

Eble n-ro 102 ne plu ekzistas. Eble ĝi estas rekonstruita, eble la numeroj de la domoj estas ŝanĝitaj. Sendube Berlina UEA-delegito povus min tuj informi. Sed mi volas mem esplori. Mem omaĝe malkovri parton de Esperanta literatura heredaĵo.

loĝantojn en almenaŭ unu berlina kvartalo, malgraŭ tio ke “jam antaŭ la 6a, la Hochbahn, ĉefa trafikilo en tiu ĉi kvartalo, ruliĝis preter la loĝejo de sinjorino Stecken, sur pontosimila altvojo super la Bülow-strato, kaj laŭlonge de ĝi, ĝis la stacio Nollendorf-placo”⁴. Arĥaismo, eble — sed ankoraŭ funkcia arĥaismo. Kaj per ĝi oni povos preterpasi ne nur la butikon de vidvino Stecken sed ankaŭ la loĝejon super ĝi, ĉe Bülow-strato 102 — duaetaĝe, dekstre

... kaj kiom ŝanĝiĝis Friedrichstrasse, kie lokomotivo kaj urba altfervoj pasas interproksime? (Foto el ĉ. 1930)

(p. 122) —, kie Pierre Touchard, la franca ĉefrolanto de *Kiel akvo de l' rivero*, gastis en Berlino. Ne nur preterpasi. Eventuale,

Plia beletra itinero

“[...] la Bülow-strato troviĝis tiel proksime al la Winterfeldt-placo, kie dir. Vogel havis sian instituton, ke li ne bezonos uzi transportilon. [...] Unue, laŭlonge de la Bülow-strato ĝis la Nollendorf-placo; de tie, preter la Hochbahn-stacio, maldekstren tra la Massen-strato, kaj jam etendiĝis antaŭ li la nuda spaco de l' Winterfeldt-placo, ĉe kies alia fino leviĝis preĝejo. La randon de la placo markis kelkaj akacioj.

Du domolinioj ĉirkaŭbrakas la placon. Oriente la Gleditsch-strato, okcidente la Goltz-strato. Nur por kontroli la precizecon de sia scio, kaj ĉar li havis ankoraŭ sufiĉan tempon antaŭ sia rendevuo, Pierre faris kelkajn paŝojn al la Gleditsch-strato, kiun li facile identigis dank' al tiuj ŝildoj ĉe la stratanguloj, kiuj indikas larĝlitere kun la stratnomo ofte ankaŭ la sinsekvon de l' domnumeroj, pro kio Pierre komplimente riverencis, almenaŭ enpense, al la berlina magistrato. Li reiris al la Goltz-strato kaj baldaŭ staris ĉe la celo.”

El *Kiel akvo de l' rivero*, p. 140-141

1. V. Varankin: *Metropoliten*. TK: Kopenhago, 1977 (2-a eld.), p. 44.

2. W. Auld: *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto*. Itis: Saarbrücken, 1979, p. 68.

3. P. Thorsen: *Anstataŭ recenzo*. En: *Stokita vino*. Edistudio: Pisa, 1996, p. 24.

4. R. Schwartz: *Kiel akvo de l' rivero*. Edistudio: Pisa, 1991 (3-a eld.), p. 116.

VIZITU VIAN PROPRAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

10^A MALFERMA TAGO

sabaton la 24-an de aprilo 1999 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj

Speciala gasto:
MARJORIE BOULTON



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezento de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Por unu frazo tutmonda

Edmond Ludwig - Francio

Laŭ la aŭtoro, aganto de TAKE*, nia movado devas scii ne nur *kion* diri, sed ankaŭ *kiel* diri. Por efikeco necesas unueca mesaĝo.

Sur kunvokilo al estrarkunsido de la orientfranca E-asocio mi legis la demandon “Kion diri?” sub la rubriko “varbado”. Ĝin starigis la prezidanto, François Xavier Gilbert, eksa direktoro de komerca ĉambro, kiu laŭ faka kompetento komprenegas ke gravas la mesaĝo direktenda al niaj klientoj por vendi nian produkton!

Antaŭ ol verki ekrespondon, mi devas — kiel ĉiam kiam temas pri iel komerca alpaŝo — informi vin ke mi estas ĝisosta esperantisto, kiu komprenis ke sen nia idealo la projekto de Zamenhof ne iĝintus lingvo, kaj ke tiu lingvo eble ankoraŭ sufiĉe longe bezonos laboregon idealisman.

Ĉi tiun deklaron mi faras pro reagoj post prezentado de miaj ideoj antaŭ e-ista publiko. Ekzemplo estu mia klopodo uzigi en la franclingvia gazetaro, en radio- kaj televido-intervjuoj la francan vorton *espérantophone* (“E-parolanto”) prefere al *espérantiste*, kies sufikso *-iste* pensigas

Kiam la estraranoj de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE) kunvenis la 4-an de julio 1998, atingis ilin la informo ke mortis Gaston Eboe, prezidanto de la klubo Espero en la vilaĝo Anyronkopé (vd. okt., p. 184), kaj ke la enterigo okazos la postan tagon. Necesis ke la landa asocio estu reprezentata ĉe la enteriga ceremonio. Tial delegacio de la estraranoj kaj de aliaj e-istoj ĝin ĉeestis.

Sed kion oni povas fari por montri la internacian lingvon en tia okazo? La ĉeestantaj esperantistoj surmetis la vestojn de la piedpilka teamo de UTE, kun la skribaĵo “Esperanto”. (Red.: Videblajn sur la kovrilo de nia n-ro 1091, apr. 1997.) En tiuj vestoj ili sidis inter la partoprenantoj de la ceremonio, deklamis vivpriskribon de nia samideano ĵus mortinta, kaj poste portis la ĉerkon de la hejmo ĝis la tombejo. La UTE-delegacio kunportis ankaŭ iom da mono, por aĉeti drinkaĵojn al la tamtamantoj (kutimo en la regiono), kaj por doni aliiom al la vidvino, patrino kaj aliaj familianoj de la mortinto. La UTE-delegitoj klarigis multon pri la internacia lingvo, kaj tiel homoj kiuj sciis pri ĝi apenaŭ aŭ neniom, informiĝis pri la funkciado de la verda movado.

Tiu elpaŝo de UTE similas al komerca reklamado. Nun Esperanto estas kvazaŭ transportita el Esperantujo al krokodilujo: oni do povas paroli pri “Esperanto-eksportado” (EsEko).

EsEko estas aro da klopodoj, kun la fina celo transformi neesperantiston al plena esperantisto. Tial necesas informi/reklami/propagandi pri Esperanto, instrui la lingvon, lernigi ĝian praktikadon kaj eduki pri la verda movado. Nur kiam ĉiu el tiuj kvar “rubrikoj” estos efektivigitaj, la novaj esperantistoj vere enhejmiĝos en la movado kaj evitos

De entombigo al Esperanto-ek

Eĉ morto de aktivulo povas esti okazo por informado pri kaj elirpunkto por metodikaj riprenoj.



Ankaŭ esperantistoj akompanas klubestron Gaston Eboe al lia lasta ripozejo.

multajn mispaŝojn; eĉ neesperantistoj malkovros la socian valoron de Esperanto kaj sekve ekinteresiĝos pri la internacia lingvo. Tre ofte niaj klopodoj koncernas la unuajn tri paŝojn, kaj eĉ ilin ni pritraktas tre supraĵe. Ni klopodu

franclingve pri ano de sekto. Mi ĝojas ke fine la francaj samideanoj eksekvas la konsilon de TAKE: dum preskaŭ duhora elsendo ĉe la tutnacia radio-stacio France-Inter (vd. p. 56), aŭdiĝis ĉefe *espérantophone*. Finfine la movado sciigas francalingve ke ĝi prezentas kaj vendas lingvon. (Mi esperas ke neniu plu en la movado — krom esceptokaze — proponas senpagajn kursojn!)

Kadre de la Strategia Forumo dum la UK en Montpellier okazis kunveno de multaj fakaj asocioj kun UEA, kaj estis decidite ree kunveni en Berlino. (Vd. sep. '98, p. 158.) Dum tiu kunveno mi pledis por kunlaboro pli kaj pli strikta inter UEA kaj la fakaj asocioj, uzante bildon: sur la ondoj al iu baldaŭ venko navigu meze de pli kaj pli granda ŝipetaro (la fakaj asocioj) la nutraĵ- kaj energi-provizanta patrino ŝipego UEA. Cetere: oni eĉ povus imagi ke iam inversiĝos la situacio: la ĉirkaŭaj ŝipoj pli kaj pli potencu kaj eknutru la gvidan ŝipegon! Tiun celon ni almenaŭ alstrebu.

Unueciga slogana mesaĝo

Kiel helpu UEA jam nun? Ke UEA ne riĉas estas vaste sciata. Ni do ne petu monon de ĝi! Sed federaciigan kaj inform-distribuan povon ĝi ja havas, eĉ repacigan: ni ĝoju pro la esperigaj kontaktoj kun SAT. Ĝi do eble kapablas disponigi al la aganta esperantistaro simplan, sed esprimivan sloganon ripetotan dum la venontaj jaroj en la tuta mondo, kaj senrezerve uzeblan de laŭeble ĉiuj unuopuloj aŭ asocioj. Tiu slogana mesaĝo komprenigu ke Esperanto celas al rekta kaj efika interkompreniĝo inter homoj diverslingvaj, sed ke gravas por ĝi la pluvivado de kiel eble plej multaj lingvoj.

Tiu slogano estu la plej malgranda komuna denominatoro de la movadanoj. Ne eblas fari pli, ĉar UEA ne estas entrepreno, kiu povus devigi siajn dungitojn fidele disvastigi la estran mesaĝon.

UEA ankaŭ povus komprenigi al la samideanoj ke la vorto "Esperanto" estu videbla surstrate, ne nur okaze

de E-araĝoj, sed ĉiutage, en kiel eble plej multaj lokoj. Ĉiu reklamilo publika surhavu bone videble la vorton "Esperanto". Flagoj estu gajkoloraj kaj pli similu flagojn de entreprenoj ol tiujn de nacioj. Necesas tamen konsideri ke multaj samideanoj ankoraŭ ne kuraĝas sin deklari E-parolantoj fiksante panelon aŭ flagon ĉe sia loĝloko. TAKE jam ekagis sur tiu tereno per la disponigo de ruĝaj reklampaneloj "3615 Esperanto"**, kaj ni konstatis tiun heziton.

Ĉu eblas jam nun imagi ke tia kampanjo, nepre longdaŭra, eku en nia Esperantio? Kompreneble, monrimedoj pli kaj pli imponaj rapidigus la efikon de tia ripetado.

*Red.: Fondita en 1993 en Alzaco, Tutmonda Asocio de Konstruistoj E-istaj aktivis — preter la fako kiun indikas ĝia nomo — vastaskale en la kampoj de ekonomio, reklamado kaj informado. Pri ĉi tiuj temoj ĝi eldonas la jarkvaronan revuon *La Domo* (RN 83, rue de Tiefenbach, FR-68920 Wintzenheim, Francio).

**Elektronika reklamservo de Unuiĝo Franca por Esperanto. Vd. nov. '97, p. 191.

Esperanto

i Esperanto,

Parfo Aĵto - Togolando*



Komplezo de Parfo Aĵto

aliri ankaŭ la kvaran rubrikon kaj enprofundiĝi en ĉiujn kvar. Partiano de EsEko, kiun mi ŝatus nomi "esekisto", estas ĉiu esperantisto kiu plenumas ĉiujn kvar rubrikojn, regante metodojn kaj sistemojn kiuj ebligas bonan agadon. Se la klopodoj de esekistoj estos bone kondukitaj, Esperanto integriĝos en ĉiun lokon atingitan, kaj ankaŭ tiu loko integriĝos en la Esperanto-movadon. Esperantujo do certapaŝe plivastiĝos ĝis malapero de kro-

kodilujo; kaj eĉ se krokodilujo plu ekzistos, ĝi konsistigos kun Esperantujo du ujojn kiuj bezonas unu la alian.

*Redaktoro de OVO, p/a TIETO, B.P. 13169 Lomé, Togolando

ŜLOSILLO AL 76 LANDOJ



Probable la plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj *Pasporta Servo* aperadas ekde 1974. La freŝa, 174-paĝa kajero *Pasporta Servo* 1999 enhavas 945 adresojn — 74 pli ol pasintjare — en 76 landoj.

Gastigantoj ricevas senpage la liston. Aliaj povas ĝin mendi je €10,90 (kun triona rabato por minimume tri ekz.). Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA aŭ de la landaj organizantoj.

La sekva aliĝa limdato estas la 1-a de nov. 1999. Jamaj gastigantoj ricevos memorigilon en aŭgusto.

Pliaj informoj ĉe la kompilanto: Derk Ederveen, Westenburgstraat 15, NL-2275 XR Voorburg, Nederlando; ✉pasporta.serveo@esperanto.nu, <http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>.

INTERNACIAJ EKZAMENOJ

Dum la Berlina UK okazos Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA je la elementa kaj meza niveloj. Ili konsistos el tri partoj: gramatika antaŭ-testo, skriba parto kaj parola parto. Nur la sukcesintoj en la gramatika antaŭtesto rajtos partopreni la skriban parton kaj, atinginte en tiu la sukceslimon de 60 poentoj, ankaŭ la parolan parton.

Pro praktikaj kialoj maksimume 24 kandidatoj povos ekzameniĝi. Pro tio konsilinda estas anticipa sinanonco, prefere antaŭ la 1-a de julio, ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando; ☎+31/72/571-79-18; ✉574-76-70; ✉ten.hagen.esperanto@uws.nl. Samtempe oni pagu speciale favoran ekzamenkotizon, egalan al 40% de la MA-kotizo por la loĝlando de la kandidato, al la UEA-konto "ilek-a" aŭ rekte al la kasisto de IEK: B. Andréasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby, Svedio; poŝta ĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Kaze de nereprezentigo aŭ nesukceso en la antaŭtesto oni ricevos duonon de la pagita sumo.

Se la maksimuma nombro de ekzamenotoj ne jam estos atingita, eblos sin anonci surloke en la kongresejo ĉe la ILEI-budo je dimanĉo. Tiam la ekzamenkotizo estos 60% de la koncerna MA-kotizo.

IEK aparte atentigas la delegitojn de UEA pri la rekomendo de la Estraro de UEA: "delegitoj atingu almenaŭ la nivelon de la Meza Ekzameno".

Hans ten Hagen, sekretario de IEK

UK Ĝis la 28-a de feb. al la Berlina UK (31 jul.-7 aŭg. 1999) aliĝis 1939 personoj el 55 landoj.

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la inform-oceano de Tut-Tera Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj konsultindaj paĝoj Esperantaj!



FILMOJ

Filmoj uzintaj Esperanton: anglalingva informo pri *Incubus* (1965, kun William Shatner, antaŭ ol li famiĝis kiel kapitano Kirk en *Star Trek*) kaj *Gattaca* (1997): <http://us.imdb.com/Sections/Languages/Esperanto/aol.com/>

KORESPONDPETOJ

Enrique Ellemberg (✉enrike@aol.com): <http://members.aol.com/enrike/ekspeto.htm>
Sveda E-Federacio: <http://www.esperanto.se/>

LITERATURO

Eldonejo Al-fab-et-o (Sten Johansson): <http://www.angelfire.com/co/alfabeto/>
Tincĵo: <http://www.esperanto.net/martin.weichert/tincxjo.html>

MOVADOJ

Amikeca Reto (senprofita asocio sub la protekto de SAT): <http://www.creaweb.fr/a.reto/>

Pacmovado belga, "Vrede vzw": <http://www.democratisch-links.be/vrede/esperanto/>
Progresema Esperanto-Forumo: <http://members.tripod.lycos.nl/jakvo/index.html>
UEA, tabeloj, citaĵoj (Ziko M. Sikosek): <http://mitglied.tripod.de/ziko/hist/ueap.htm>

PILGRIMADO

De geedzoj Hedwig kaj Rudolf Fischer (Germanio) al Santiago de Compostela: <http://medweb.uni-muenster.de/~fischru/jakob-o.html>

REVUOJ

Dumonata Bulteno, ne nur loka interesa gazeto de Torina Esperanto-Centro (parte itale, kun la enhavo de du numeroj): <http://www.arpnet.it/~esper/>
Forum (n-ro 98/6) de GejLesba Esperanto-Asocio: http://esperanto.net/lsg/Laŭte!, "liberesprima gazeto por E-progresemaĵoj (ĝis nun numeroj sep. kaj nov. 1998): <http://www.solnet.arrakis.es/laute/>
Listo de Esperantaj gazetoj en TTT: <http://www.esperanto.se/virtuala/gazetoj.html>

TRADUKPROGRAMO

Por 17 lingvoj, i.a. Esperanto: <http://www.dictionaries.travlang.com>

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko

helpas al la Esperanto-movado



en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon sendu pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA.

Koresponda Servo
Mondskala de UEA

ricevis 419 korespondpetojn en 1998. Ĝi revenis al nivelo kutima en 1993-95 (inter 362 kaj 421 petoj). La rekordjaroj 1996-97 (579 resp. 550 petoj) restas esceptaj pintoj.

KSM: Ree normala ritmo

La petoj en 1998 venis el 53 landoj; en 1997 el 59 landoj. Plej multaj estis senditaj el Francio (70), Brazilo (59), Ruslando (38), Irano (22), Kubo (21), Madagaskaro (19), Pollando (13), Hungario (11) kaj Germanio (10).

Kalendaro 1999

Kvankam ni laŭeble kontrolis la divers-fontajn informojn pri la menciitaj aranĝoj, ni ne povas garantii la fideindecon de ĉiu ero en ĉi tiu kalendaro.

marto

- 15-20: **15-a Internacia Simpozio pri E-turismo**, Samarkando, Uzbekio (Anatoli Ionesov, 53 Sharaf Rashidov str., UZ-703000 Samar-kand; ☎+7/3662/331-753; ✉333-971; temo: "Eŭropo-Azio")
- 20-21: **Jarkunveno de Dana E-Asocio**, Kopenhago, Danio (Københavns Esperanto Klub, Højlundshusene 16, DK-3500 Værløse; ☎+45/44-48-47-26)
- 20-21: **Vintraĵ Tagoj**, Tampere, Finnlando (E-Societo Antaŭen*)
- 21: **Trilanda Renkontiĝo**, Stollberg, Germanio (Klaus Hogen, Im Pesch 20, DE-52134 Herzogenrath; ☎+49/24-06-78-09; ✉24-06-77-06; ✉hogen@t-online.de)
- 26-30: **6-a MIRO**, Miskomprena Internacia Renkontiĝo, Tisno, Kroatio (KEJA, Amruševa 5/1, HR-10000 Zagreb; ✉vlado@esperanto.nu)
- 27-28: **Kien Ruslando?**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE*, gvidas György Nanovszky)
- 31-06 apr.: **23-a Internacia Junulara Festivalo kaj 5-a Itala Studadesio de AIS**, Rimini, Italio (Manuel Giorgini, S. Polo 606, IT-30125 Venezia; ✉mgiorgin@dsi.unive.it, http://www.Esperanto.it/iej/ief; temo: "Esplori kaj scii")



23-A INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO
31 marto-6 apr.
"Esplori kaj scii"

aprilo

- 02-04: **21-a E-Renkontiĝo de la ŝtato San-Paŭlo**, Franca, Brazilo (Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, Rua Faustolo, 124, BR-05041-000, São Paulo - SP)
- 02-05: **83-a Brita Kongreso**, Newport, Kimrio, Britio (John L. Hubert, Blaencwm, Pencader Dyfed, Kimrujo, Britio SA39 9AL; ☎+44/1559/384-687; ✉johnhubert@csi.com, http://members.tripod.com/~esperantowales)
- 02-05: **Fromaĝa semajnfino**, Pierrefontaine-les-Blamonts, Francio (Didier Loison, 45 rue Verrerie, FR-21000 Dijon; ☎+33/3/80-50-11-28; ✉dloison@esperanto.org)
- 03-05: **54-a Kongreso de SAT-Amikaro**, Glaj, Francio (Roland Cuenot, 35 rue de Villers, FR-25700 Valentigney; ☎+33/3/81-34-64-46)
- 03-07: **Ornitologia renkonto**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Johano Rapley)
- 03-10: **15-a Printempa Semajno Internacia**, St. Andreasberg, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ✉2641/978-666; ✉psi@esperanto.de, http://www.esperanto.de/psi; temo: "Kultura diverseco en Eŭropo")
- 09-11: **Junulara E-Renkonto**,

Sárospatak, Hungario (Dávid Alko Golden, Damjanich u. 1/c. I.8, HU-8200 Veszprém, Hungario; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉hej@math.bme.hu)

- 09-11: **Pri io kaj nenio**, amuza kunestado, Poprad*, Slovakio
- 13-17 kaj 20-24: **Didaktiko kaj pedagogio**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Claude Gacond)
- 16-18: **Regiona Renkontiĝo**, Martin, Slovakio (Esperanto-MEL, Pf. 152, SK-01241 Žilina; ☎+421/895-21-52)
- 19: **Lingva seminario** de Asocio de E-istoj Handikapuloj, Skokovy, Ĉeĥio (Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, CZ-29301 Mladá Boleslav; ☎+420/326/731-845)
- 21-23: **13-a Seminario pri Scienco kaj Tekniko**, Karlovo, Bulgario (Bojdar Leonov, P.K. 44, BG-4300 Karlovo)
- 21-25: **Volgia E-Renkontiĝo**, Naberežnye Ĉelny, Ruslando (RU-423819 Tatarstan, Naberežnye Ĉelny, ab. ja. 133; ✉arosjev@usa.net)
- 22-25: **Internacia seminario "La religio kaj la homaro"**, Karlovo, Bulgario (Bojdar Leonov, P.K. 44, BG-4300 Karlovo)
- 24: **Malferma tago de la Centra Oficejo**, Roterdamo (vd. anoncon sur p. 46)
- 24-25: **La bona lingvo** de Claude Piron, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE*)
- 24-26: **9-a Internacia E-Kurskunveno**, Yangpyung ĉe Seulo, Koreio (Seula Esperanto-Kulturcentro, CPO Kesto 3047, Seoul - 100-630; ☎+82/2/756-48-59; ✉esperant@unitel.co.kr, http://www.esperanto.co.kr)
- 24-26: **Studsemajnfino**, Steensel, Nederlando (Jeannette Bosse-Sibbel, P. Dondersstraat 23, NL-5613 LP Eindhoven; ✉hj.bosse@wxs.nl)

* ADRESARO

Jen la adresoj signitaj per asterisko tra la kalendaro rubriko. Ĉiuj aliaj adresoj troveblas post la koncernaj aranĝoj.

AIS: Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, DE-37077 Göttingen, Germanio; ✉blewo1@hrz.uni-paderborn.de

Barlaston: Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., Britio ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; ☎372-393; ✉wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

Ejst: Svetlana Ejst, ul. P. Germana 15-198, RU-198329 Sankt-Peterburg, Ruslando; ☎+7/812/136-02-29

E-Societo Antaŭen: Teivaalantie 85, FI-33400 Tampere; ☎+358/3/346-34-93; ✉veli.hamalainen@kolumbus.fi

Grésillon: Kultura Esperanto-Domo, FR-49150 Bauge, Francio; ☎+33/2/41-89-10-34

HEA: Hungaria E-Asocio, Pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario; ☎+36/1/268-03-06; ✉268-03-31; ✉esperantohea@mail.c3.hu

KCE: Kultura Centro E-ista, C.P. 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎+41/32/926-74-07

Komlóšiová: Alica Komlóšiová — ESO, Rovníková 6, SK-82102 Bratislava, Slovakio; ☎+421/7/291-604

Kvinpetalo: FR-86410 Bourses, Francio; ☎/✉+33/5/49-42-80-74; ✉rapley@club-internet.fr

Monda Turismo: ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz; ☎/✉+48/52/341-57-44; ✉andreo@rubikon.net.pl, http://www.bydgosz.pdi.net/~turismo

Poprad: E — Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio; ☎/✉+421/92/32-419

Xi'an-a E-Asocio: p/a Vicio, Jian-Gong-Lu 3, Xi'an CN-710043; ☎/✉+86/29/22-32-95-20; ✉vicio@esperanto.nu

25-02 majo: **TEJO-seminario**, Torino, Italio (Lariko Golden, Damjanich u. 1/c. I.8, HU-8200 Veszprém, Hungario; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉golden@osiris.elte.hu; temo: "Lokaj kulturoj en tutgloba mondo")
30-02 majo: **Printempa E-ista Renkontiĝo** en Altaj Tatroj, Poprad*, Slovakio

majo

01-03: **E-Grimpado al Hua-monto**, oriente de Xi'an, Ĉinio (Xi'an-a E-Asocio*)
01-09: **20-a Sanmarineca Universitata Sesio**, Bydgoszcz, Pollando (AIS*)
03-11: **Aroma Jalto' 99**, Jalto, Ukrainio (UA-252133, Kiev-133, ab. skr. 35; ✉aznauka@berdyansk.net)
07-09: **Nord-Okcident-Regiona E-Konferenco**, Dunsmuir Lodge, Brita Kolombio, Kanado (Wally Du Temple, 765 Braemar Ave., V8L 5G5 North Seanich, B. C.; ✉dutemple@islandnet.com)
08-15: **51-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio**, Le Mans, Francio (Jean Ripoché, 6 rue des Platanes, La Gautrie, FR-72230 Arnage; ☎+33/2/43-21-16-39; ✉Jean.Ripoché@wanadoo.fr)
13-16: **Printempa renkontiĝo**, Eijsden/Mesch, Nederlando (NEJ, p/a Fabien van Mook, Molenstraat 46 C, NL-5701 KG Helmond; ☎+31/492/521-991; ✉nej@dds.nl, http://huizen.dds.nl/~nej/p-r.html; temo: "Euregioj")
13-16: **Vizito de abatejoj**, La Kvinpetalo*, Francio (gvidas Monique Dussenty kaj Thérèse Pinet)



PRINTEMPA
RENKONTIĜO
13-16 majo
"Euregioj"

13-16: **Kongreso de E-ista Federacio de Laboro**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE*)
14-16: **BIEKO '99**, Bratislavo, Slovakio (Kotláršiová*)
21-23: **Konferenca semajnfino kaj kunveno de SATEB**, Barlaston*, Britio
21-23: **13-a E-Renkontiĝo de la ŝtato Rio-de-Janeiro**, Paraiba do Sul, Brazilo (Asocio E-ista Rio-de-Janeiro, R. Senador Dantas, 117 - Sala 1341, C.P. 840, BR-20001-970 Rio de Janeiro - RJ; ☎+55/21/240-61-19; ✉aerj@infolink.com.br)
21-24: **Pentekosta semajnfino**, Antverpeno, Belgio (Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; ☎+32/3/234-34-00; ✉233-54-33; ✉fel@agoranet.be, http://esperanto.agoranet.be/fel)
21-25: **91-a Kongreso de Unuiĝo Franca por E-o**, Fournols ĉe Clermont-Ferrand, Francio (Raymonde Pérault, UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; ☎+33/1/42-78-68-86; ✉42-78-08-47)
22-24: **Pentekosta migrado en Ĵuraso**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE*)
23-25: **E-staĝo**, Préfaillies, Francio (Hélène Vincent, 3 rue Blaise Cendrars, FR-44100 Nantes; ☎+33/2/40-43-92-42)
28-30: **94-a Skota Kongreso de E-o**, Kirkwall, Orkadoj, Britio (Irene Bennett, "Rossignol", Glaitness Road, St. Ola, Kirkwall, Orkney, Britio KW15 1TW; ☎+44/1856/875-033)
29-30: **3-a Kongreso de Kroatiaj E-istoj**, Osijek, Kroatio (KEL, Amruševa 5, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/481-01-52; ✉481-70-67; ✉esperanto@zg.tel.hr)

junio

02-09: **Tutsemajna staĝo**, Batipauze apud Agde, Francio (Suzanne Authier, 9 rue Georges Picot, FR-34500 Béziers)
04-05: **2-a Rendevuo pri E-o kiel laborlingvo de sano**, Ribeirão Preto - SP, Brazilo (Instituto Homeopático François Lamasson, rua Américo Brasiliense, 1418, BR-14015-050

Ribeirão Preto - SP; ☎+55/16/636-88-89; ✉lamasson@netsite.com.br)

04-06: **5-a Danuba E-Rendevuo kaj E-kulturfesto Abritus**, Razgrad, Bulgario (Esperantista

94-A SKOTA KONGRESO
DE ESPERANTO
28-30 majo



domo de kulturo, str. Sv. Kliment EK-3, BG-7200 Razgrad; ☎+359/84/32-694)
04-06: **800 jaroj Rendsburg – 80 jaroj E-o en Rendsburg**, Germanio (Wilma Lehmann, Gerichtsborg 17, DE-24678 Rendsburg; ☎+49/4331/72-941)
06-12: **21-a Ĉebalta E-ista Printempo**, Mielno, Pollando (Pola E-Asocio, pk. 30, PL-75-016 Koszalin-1; ☎+48/94/340-45-63)
11-13: **19-a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj**, Toruń, Pollando (Etnografia Muzeo, ul. Waly Gen. Sikorskiego, PL-87-100 Toruń)
11-13: **56-a Norvega E-Kongreso**, Fana apud Bergen, Norvegio (Norvega E-ista Ligo, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo; ☎+47/22-35-08-94; ✉esperanto@online.no)
24-27: **3-a Danuba E-lingva Scienca kaj Kultura Forumo**, Poprad*, Slovakio
26-03 jul.: **Blankaj noktoj**, Sankt-Peterburgo, Ruslando (Ejst*)
26-27: **Speciala monاتفino**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE*)
27: **Turisma E-Festo**, St-Laurent-de-la-Plaine, Francio (KEC, 6 rue du Buis, FR-49000 Angers; ☎+33/2/41-66-83-36; ✉41-78-47-75; ✉laurent.vignaud@wanadoo.fr, http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/kio.htm)
27: **Tutlanda Jarpikniko**, Huizingen ĉe Bruse-lo, Belgio (Marcel Delforge, 16, rue des Glacières, BE-6001 Marcinelle/Charleroi)
30-04 jul.: **FREŜO**, Olsztyn, Pollando ("Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Obstinulojn"; Andrzej Gielert, ul. Murzynowskiego 22/27, PL-10-684 Olsztyn; ☎+48/89/542-88-98; ✉angiel@polbox.com, http://www2.art.olsztyn.pl/fresxo/)

Somero 1999 en Greziliĝono

24-31 julio: "Vortaro kaj tradukado" kun Danièle Lévy. "Kantoj kaj gitara muziko" kun Monika Kimel. Kurso por komencantoj kun Przemek Grzębowski.

1-7 aŭgusto: Peckudrado kun Marie Malézieux. Kurso de Georges Lagrange kaj eventuale de Daniel Moirand. Kurso por komencantoj kun Przemek Grzębowski.



8-14 aŭgusto: "Jogo kaj Esperanto" kun Rose-Marie Laveau. Kurso de Daniel Moirand.

15-21 aŭgusto: Teatro kun Sylvie Bonnet. Kurso meznivela de Christian Rivière. Kurso de Janine Dumoulin kun literaturaj tekstoj.

Kontaktu: Kultura Esperanto-Domo, FR-49150 Baugé, Francio; ☎+33/2/41-89-10-34

Julio

- en julio: **La hispana poezio**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Miguel Fernández)
- 02-04: **Eduka semajfino**, Tampere, Finnlando (E-societo Antaŭen*; instruas Katalin Smidéliusz)
- 03-17 kaj 18-31: **Somera E-Tendaro**, Lančov, Ĉeĥio (Pavel Sittauer, Hartmannova 1128, CZ-674 01 Třebíč)
- 04-14: **39-a OKSEJT (Okcidenta Sovetia E-ista Junulara Tendaro)**, Tihvin, regiono de Sankt-Peterburgo, Ruslando (Ejst* kaj ananjin@usa.net [Andrej Ananjin]; temo: "Mondo, kiun kreas vi")
- 04-18: **Somera E-Lernejo**, Poprad*, Slovakio
- 05-09: **Semajno de 12 steloj**, 5-a Internacia E-semajno, Tampere, Finnlando (Jukka Laaksonen, Uudenkylänkuja 2 B 11, FI-33530 Tampere, Finnlando; ☎+358/3/255-47-24; laaku@koti.tpo.fi; instruas Katalin Smidéliusz)
- 05-10: **Internacia kantostaĝo** de Orientfranca E-Federacio, Haguenau, Francio, (Jacqueline Schmitter, 28 rue Ste Adélaïde, FR-67660 Betschdorf; ☎+33/3/88-54-46-46; gvidas hor-estrino Jacqueline Schmitter)
- 05-10: **Progresiga kurso kaj Inicado kaj praktikado de joko**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Paul Gubbins resp. Arlette Plutniak)
- 06-23: **30-a Somera E-Kursaro**, San-Francisko, Usono (Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Road SW, Olympia, WA 98512; ☎+1/360/754-45-63; Δ786-91-75; eddyellen@aol.com; instruas Mark Fettes, Atilio Orellana Rojas, Joel Brozovsky kaj Maria Hopkins)
- 10-11: **3-a Festivalo de Esperanta Video-Filmo**, Maribor, Slovenio (Inter-kulturo, Besednjakova 1, SI-2000 Maribor)
- 10-12: **17-a Internacia Somera E-Universitato**, Veliko Tarnovo, Bulgario
- 11-18: **Turisma semajno**, Poprad*, Slovakio
- 12-16: **35-a Brazila Kongreso de E-o kaj 20-a Brazila E-ista Junulara kongreso**, Campo Grande MS, Brazilo (Societo de Esperanto Mato Grosso do Sul, Rua 15 de Novembro,



72-A KONGRESO DE
SENNACIECA
ASOCIO
TUTMONDA
24-31 julio

- 230/55, C.P. 3530, BR-79002-140 Campo Grande - MS; temo: "Esperanto: kulturo, sporto, ekologio, turismo")
- 15-22: **3-a Somera E-Lernejo**, Banja Vrućica ĉe Teslić, Bosnio-Hercegovino (E-Societo Teslić, P.k. 20, BA-74270 Teslić, Serba Resp.; ☎+381/74/731-700; Δ731-063; esperote@etf-bl.rstel.net)
- 17-21: **58-a Hispana Kongreso de E-o kaj 9-a Eŭropa E-Forumo**, Castellón, Hispanio (Augusto Casquero, Av. Burjasot 29, A-31, ES-46009 València; ☎/Δ+34/96/340-13-69; acasquero@redestb.es, <http://www.redestb.es/personal/a-casquero>)
- 17-23: **Internacia E-Konferenco** de OSIEK, Metz, Francio (Eric Laubacher, 1 rue Louis-Antoine de Bougainville, FR-78180 Montigny-le Bretonneux; erici@iname.com, <http://osiek.org>; temo: "Mono kaj civilizo")
- 17-24: **35-aj Baltiaj E-Tagoj**, Liepāja, Latvio (Latvia E-Asocio, a.k. 150, LV-1050 Rīga; ☎+371/2/938-672; Δlekanto@adm.am.lv)
- 17-24: **18-a Katolika E-Tendaro**, Sebranice, Ĉeĥio (Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, CZ-751 27 Penčice, Ĉeĥio)
- 21-24: **Internacia Renkontiĝo** de Asocio de E-istaj Handikapuloj, Pardubice, Ĉeĥio (Internacia klubo de AEH, Na okrouhliku 953/21, CZ-53003 Pardubice)
- 22-24: **4-a E-ista Renkontiĝo de Serba Respubliko**, Banja Vrućica ĉe Teslić, Bosnio-Hercegovino (E-Societo Teslić, P.k. 20, BA-74270 Teslić, Serba Resp.; ☎+381/74/731-700; Δ731-063; esperote@etf-bl.rstel.net; temo: "Praktika uzado de E-o")
- 24-29: **12-a Internacia Medicina E-Konferenco**, Opava, Ĉeĥio (Eva Kopečná, Pekařská 84, CZ-747 05 Opava; ☎+420/653/219-086)
- 24-31: **Kulturaj aranĝoj**, Grésillon*, Francio ("Vortaro kaj tradukado" kun Danièle Lévy, "Kantoj kaj gitara muziko" kun Monika Kimel, kurso por komencantoj kun Przemek Grzębowski)
- 24-31: **72-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda**, Karlovy Vary, Ĉeĥio (Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice; ☎+420/2/991-22-01; Δ991-21-26; chrdle@telecom.cz, <http://rafale.worldnet.net/~sat-esp>)
- 25-31: **65-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj**, Berlino, Germanio (Theodor Speckmann, Trierer Str. 45, DE-50674 Köln)
- 29-01 aŭg.: **18-a Komuna Seminario de koreaj, ĉinaj kaj japanaj gejunuloj**, Wanihama ĉe Kioto, Japanio (KS18 ĉe Japana E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162; Δ+81/1656-7-2817; Δjunuloj@po.teleway.ne.jp)



84-A UNIVERSALA KONGRESO DE
ESPERANTO

31 jul.-07 aŭg.

"Tutmondiĝo — ŝancoj por paco?"

31-07 aŭg.: **84-a Universala Kongreso de Esperanto**, Berlino, Germanio (CO de UEA, adreso en la kolofono; <http://www.esperanto.de.uk99>; temo: "Tutmondiĝo — ŝancoj por paco?"

Aŭgusto

- 01-03: **E-Grimpado al Taibai-monto**, okcidente de Xi'an, Ĉinio (Xi'an-a E-Asocio*)
- 01-07: **Kulturaj aranĝoj**, Grésillon*, Francio (Kurso pri peckudrado kun Marie Malézieux, kurso de Georges Lagrange kaj eventuale de Daniel Moirand, kurso por komencantoj kun Przemek Grzębowski)
- 02-08: **Somera E-Tendaro Intermondo-2**, Volgograd, Ruslando (Eduard Kolosov, str. Vostočno-Kazhastanskaja 6-46, RU-400094 Volgograd 94; Δedik@esperanto.nu)



35-A BRAZILA KONGRESO DE
ESPERANTO

kaj
20-A BRAZILA ESPERANTISTA
JUNULARA KONGRESO
12-16 jul.

"Esperanto: kulturo, sporto, ekologio, turismo"

- 07-12: **Pri verda politiko**, seminario de Asocio de Verduloj E-istaj, Jetřichovice, Ĉeĥio (Michael Wolf, Heinrich-Heine-Str. 62, DE-01844 Neustadt, Germanio; Δmichalupo@aol.com)
- 07-13: **33-a ILEI-Konferenco**, Karlovy Vary, Ĉeĥio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; temo: "Edukado al la paco")
- 07-14: **14-a Ekumena E-Kongreso** (49-a de KELI kaj 52-a de IKUE) kaj **3-a Junulara Ekumena E-Tendaro**, Gliwice, Pollando (Stanisław Mandrak, ul. Kormoranów 39/16, PL-44-114 Gliwice; ☎+48/32/132-60-35; Δ382-043; Δstaman@priv.onet.pl, <http://home.t-online.de/home/st-fidelis>; temo: "La ekumena bilanco de la 20-a jarcento")

- 07-14: **9-a Internacia E-Kongreso**, Toruń, Pollando (Monda Turismo*)
- 07-14 kaj 14-21: **Renkontiĝo de E-lingvaj Familioj** resp. **Familia Feriado**, kastelo Przytok ĉe Zielona Góra, Pollando (Christoph Knabe, Dortmund Str. 9A, DE-10555 Berlin, Germanio; ☎+49/30/391-93-56; ✉/L391-39-78; ☐knabe@tfh-berlin.de)
- 07-15: **22-a Somera Esperanta Familia/Feria Tendaro**, Thomsdorf apud Feldberg, Germanio (Eckard Raabe, Staakener Heuweg 1, DE-14612 Falkensee; ☎ [Werner Pfennig] +49/395/422-13-98)
- 08-14: **Kulturaj aranĝoj**, Grésillon*, Francio ("Jogo kaj Esperanto" kun Rose-Marie Laveau kaj kurso de Daniel Moirand)
- 09-16: **55-a Internacia Junulara Kongreso**, Zánka, Hungario (LKK de la 55-a IJK, Pf. 87, HU-1675 Budapest; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ☐hej@math.bme.hu, <http://www.math.bme.hu/~hej/ijk99>; temo: "Komunikado en la informosocio")

55a Internacia Junulara Kongreso



- 09-16: **Hungaria E-ista Semajno**, ĉe Balatono, Hungario (HEA*)
- 13-16: **18-a Internacia Literatura Forumo**, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*; temo: "Stellan Engholm")
- 14-20: **Somera E-Lernejo**, Barlaston*, Britio
- 15-21: **Kulturaj aranĝoj**, Grésillon*, Francio (Teatro kun Sylvie Bonnet, kurso meznivela de Christian Rivière, kurso de Janine Dumoulin kun literaturaj tekstoj)
- 17-21: **Multlingva staĝo**, inicado al diversaj naciaj lingvoj pere de E-o, Kvinpetalo*, Francio
- 17-22: **2-a Plurnivela Internacia Kursaro**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE*, instruas Ljubomir Trifončovski kaj Giorgio Silfer)
- 20-27: **3-a Internacia E-Staĝo**, Plouézec, Francio (Roger Eon, 5 Kervilin Izelan, FR-22470 Plouézec; ☎/L+33/2/96-22-77-17; ☐rogeon@club-internet.fr, <http://www.geocities.com/Athens/Crete/2191/bretona.html>)
- 21-26: **68-a Itala kongreso de E-o**, Riva del Garda (Trento), Italio (Itala E-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano; ☎+39/2/58-10-08-57)
- 22-25: **2-a Azia E-kongreso**, Hanojo, Vjetnamio (Vjetnama E-Asocio, 105A Quán Thánh Str., Hanoi; ☎+84/4/845-45-47; ✉843-27-56)
- 26-28: **Koboldara kunveno**, Iisalmi, Finnlando (Kultura Centro de Iisalmi, PL 5, FI-74101

Iisalmi; ☎+358/17/830-15-11; ✉830-15-58; ☐reino.eriksson@iisalmi.fi)

- 28-04 sep.: **25-a Internacia Semajno**, Sète, Francio (Esperanto, 5 rue docteur Roux, FR-34040 Montpellier; ✉+33/4/67-54-15-42)
- 29-03 sep.: **21-a Sanmarineca Universitata Sesio**, Rimini, Italio, kaj San-Marino (AIS*)

septembro

- 02-05: **Mikologia seminario**, Poprad*, Slovakio
- 03-05: **50-a Kongreso de Bulgara E-Asocio**, Vraca, Bulgario (Milčo Beloreški, p.k. 26, BG-3000 Vraca; ☐sukceso@yahoo.com; temo: "Faka agado kaj sekcioj de BEA")
- 03-07: **13-a Kongreso de Itala Katolika E-ista Unuiĝo**, L'Aquila, Italio (Serio Boschin, Via Eritrea 8, IT-31100 Treviso)
- 04-10: **7-a Internacia Turisma Semajno**, Malto (Malta E-Societo, P.O. Box 132, Valletta CMR 01; ☐maltaesp@global.net.mt; vd. la internan dorskovilon)
- 10-12: **Esperanta Malgrandkarpata Renkonto**, Bratislava, Slovakio (Komlóšiová*)
- 10-15: **La E-literaturo ekde 1952**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Ed Borsboom)
- 17-19: **Faulhaber-semajnfino**, Elspeet, Nederlando (Esperanto Nederland, p/a Ineke Emmeekamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen)
- 24-26: **15-aj Artaj Konfrontoj en E-o** (ARKONES-99), Poznań, Pollando (Zbigniew Kornicki, Os. Bol. Smialego 7/22, PL-61 002 Poznań)
- 25-29: **25-a Internacia Forumo pri Turismo, edukado kaj kulturo**, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo*)
- 30-03 okt.: **11-a Alp-Adria E-Konferenco**, Medulin/Pula, Kroatio (Kroatia E-ista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/374-50-52; ☐hes@esperanto.nu; temo: "Kulturaj rajtoj de etnaj malplimultoj en la alp-adria komunumo")

oktobro

- 02-09: **7-a Internacia E-Semajno** de la kulturo kaj turismo, Cambrils (Tarragona), Hispanio (HFEA, Apdo. 15027, ES-08080 Barcelona; ☎+34/9/37-25-34-21 kaj 37-27-50-21; ✉37-83-65-11; ☐luis_serrano@mixmail.com)
- 15-17: **86-a Japana E-kongreso**, Motizuki Nagano, Japanio (Japana E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162; ☎+81/3/32-03-45-81; ✉32-03-45-82; ☐jei@mre.biglobe.ne.jp)

- 29-01 nov.: **5-a Mediteranea Konferenco de E-ologio**, Sète, Francio (LF-koop, C.P. 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ĉeftemo: "La E-fonetiko", kun Daniele Vitali)
- 30-01 nov.: **29-a Kataluna kaj 2-a Transpirenea Kongreso de E-o**, Manresa, Katalunio, Hispanio (Kataluna E-Asocio, Apartat 290, ES-08280 Sabadell [Katalunio]; ☎/L+34/93/716-36-33; ☐kea@stel.net)

novembro

- 05-09: **1-a Internacia Konferenco pri Agrikulturo kaj medio**, Xi'an, Ĉinio (Xi'an-a E-Asocio*)
- 06-07: **10-a Kongreso de Ukrainia E-Asocio**, Kievo, Ukrainio (Vladimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kijiv; ☎+38/44/295-701; ✉295-28-70; ☐lnp@un.kiev.ua)
- 13-15: **10-a Sudbrazila E-Renkontiĝo kaj 5-a Interlanda Konferenco pri Instruado**, Florianópolis SC, Brazilo (E-Asocio de Santa Catarina, C.P. 469, BR-88010-970 Florianópolis - SC)
- 21: **12-a E-Renkontiĝo de Okcidenta Regiono**, Rio de Janeiro, Brazilo (EKOR, Str. Cel. Agostinho 126, Fundos, Campo Grande, BR-23050-360 Rio de Janeiro)

decembro

- 04-11: **12-a Konferenco de Internacia Komunista E-ista Kolektivo**, Havano, Kubo (Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell, Hispanio; ☎+34/9/37-27-50-21; ☐luis_serrano@mixmail.com)
- 27-03 jan.: **16-a Internacia Festivalo**, por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj, Münster, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Nidenstein; ☎/L+49/5624/8007; <http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm>)
- 29-02 jan.: **Budapeŝta e-ista silvestro**, Hungario (HEA*)
- 30-02 jan.: **Silvestra balo kaj vintraj ekskursoj**, Poprad*, Slovakio
- 31-01 jan.: **Novjarfesto en Karpatoj**, Ukrainio (Jaroslav Zaharija, B. Hmelnickogo str. 82/4-8, UA-284006 Ivano-Frankivsk; ☎+38/3422/62-241)

2000 kaj plu

- 25 jul.-01 aŭg. 2000: **85-a Universala Kongreso de Esperanto**, Tel-Avivo, Israelo
- 21 jul.-28 aŭg. 2001: **86-a Universala Kongreso de Esperanto**, Zagreb, Kroatio



Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj estas aparte bonvenaj. Koran dankon!

Reagoj



Utilas takte blufi

En sia interesa artikolo “Eĉ el sub la tero aperas la vero” (okt. '98, p. 165), K. Kniivilä eldiras plurajn neprajn verojn pri la jam lavange debatita temo kiel respondi al intervjuantoj kiam ili elpafas la ĉiaman demandon: “Kiom da homoj parolas Esperanton en la mondo?” Kiel jam multaj aliaj antaŭe, Kniivilä draste asertas ke nepre moralas, konvenas, utilas diri la veron, la simplan veron, do ne troigi, ne fanfaroni, ne blufi. Tamen ankaŭ li konfesas ke, por diri la veron, ni devas unue ĝin ekkoni. Jen la tubero en la afero: kiu funde konas tiun veron? Laŭ mi neniu.

Ankaŭ mi dum jardekoj certis ke konvenas diri la veron; do dekojn, eble centojn da fojoj, mi respondis la kutiman refrenon ke tute ne eblas kalkuli ekzakte la nombron de la mondaj esperantistoj, pro tio ke pluraj enketmetodoj estas utiligeblaj, sed neniu povas liveri fidindan respondon. Tamen, mi regule rimarkis ke tiaj argumentadoj ne estas ĝuste komprenataj, ke la enketantoj ricevas la negativan impreson ke ni volas ruze eviti la respondon, por kaŝi malmultnombran, nekontentan konsiston.

Tial, post jardekoj de tia “morala” konduto, mi alvenis al la konvinko ke ne nur eblas, sed ankaŭ utilas iom (takte) blufi, troigi, fanfaroni. Des pli ke mi ankaŭ konstatis ke neniu ĵurnalisto, neniu fakulo posedas sufiĉajn sciojn

por dementi ajnajn asertojn. Do, dum ĉi lastaj jaroj, jam plurfoje, okaze de ĵurnalistaj intervjuoj, mi regule kontra-bandis iom fantaziajn deklarojn (esperantistoj estis Tolstoj, Verne, Einstein, Chaplin, Tito) kaj iom blovitajn ciferojn. Ekzemple, mi deklaris ke, laŭ statistiko farita de Unesko, en la mondo ekzistas 15 milionoj da esperantistoj.

Mi ruze aldonis ke laŭ mi la nombro de la monda esperantistaro ne superas 5 milionojn. Mi rimarkis ke ĉi mia lasta precizigo influis pozitive, liveris la impreson de objektiveco. Kiam mi diris ke mia poemaro *Pretertempe* disvendiĝis en la mondo en milo da ekzempleroj, la ĵurnalisto mem komentis en la artikolo ke tio superas la normalan eldonnombron de poemaro de la itala Nobel-premiito Eugenio Montale. (Kaj la parolantoj de la itala estas en la mondo almenaŭ 70 milionoj.)

Konklude, surbaze de tiuj miaj spertoj, mi aplombas, senpudoras sugesti ke ni ne tro zorgu pri etiko, deontologio, veramo k.s. (kiujn, cetere, ĉiuj mondaj amaskomunikiloj, kaj multegaj aliaj organizaĵoj, regule ne tro atentis kaj ofte falsas kaj mistifikas), kaj ke ni tute trankvile kaj senzorge povas (rajtas) iom emfazi, ekscesi, fanfaroneti.

Spite tion ke, laŭ miaj esploroj kaj konvinko, *la veraĵo esperantistoj* en la mondo ne estas pli ol 200 000 (minus unu, la ĉi-skribanto, kiu ĵus decidis kabei).

Aldo de' Giorgi - Italio

Kalle Kniivilä respondas:

Eĉ se oni flankenlasus la moralajn argumentojn, restas la demando: kial ni mensogu? Ĉu la vero pri Esperanto ne estas konvinka? Ĉu ni mem ne estas konvinkitaj pri la valoro de niaj lingvoj kaj idealoj? Ĉu ni devas mensogi ankaŭ al ni mem? Se jes, ĉu restas alia solvo ol tiu elektita de s-roj Kabe kaj de' Giorgi?

Estimata Probal,

Rilate vian leteron “Al la Ruzantaro de Esperanto” (nov. '98, p. 200; vd. ankaŭ jan., p. 4) pri *Barato* aŭ

Bharato, eble interesus vin la sekvaj faktoj. Mi naskiĝis en Granda



Britanio; mian pasporton oni eldonis en Kimrio, okcidenta parto de la Unuiĝinta Reĝlando. Mia edzino estis naskita kiam la gepatroj el Gvanzoo fuĝis dum la Niponia invado de sia Centra Lando. Post nia geedziĝo ni feris en Suomio. Pasintan someron ni vizitis Doĵlandon kaj korespondis kun samideanoj en Magjario kaj Helasio.

Oni povus demandi kial Zamenhof ne enkondukis tiajn landnomojn. Supoze ĉar li agnoskis ke la fremdaj vortoj *Germanio*, *Japanio* ktp estas jam sufiĉe internaciaj, tial ne ŝanĝindaj.

Mi provis sendi ĉi tiun leteron al vi, en koverto sur kiu mi skribis *Bharat*, sed la poŝtaj instancoj resendis ĝin al mi.

Sincere via

Ralph A. Lewin - Usono

Por uzebla lingvo

Laŭ F. Gobbo (“Eŭropo, la lingvejo por ni?”, jan., p. 12) ordinario povas pensi ke e-istoj “ne diskonigas sin, ĉar temas pri elitularo, preskaŭ sekto.” Supozeble ĉie en la mondo ni renkontas similajn opiniojn. Sed ni scias ankaŭ tion ke ni ja informas pri E-o, sed malpli pri la uzebleco de la lingvo ol pri la movado mem — ĉar ni apenaŭ povas proponi nemovaduman utiligon de la lingvo.

Ni devus uzi (ne uzigi) E-on en la praktiko en ĝia vera funkcio, kiel inter-nacian lingvon de malsamlingvuloj. Bedaŭrinde eĉ de niaj fakaj asocioj nur triono celas unuavice disvastigi Esperanton inter samfakuloj.

Oszkár Princz - Hungario

Fina venko per referendumoj

F. Gobbo asertas: “neracio-nivelo de iu lingvo alsupras laŭ la kresko de ties parolantaro”. Tamen, dum la jarcentoj de sia evoluo la rusa lingvo iĝadis malpli komplika kaj pli logika, dum ĝiaj parolantoj nombre kreskis.

Ankaŭ mi longe maltrankvilis ke post oficiala akcepto en EU Esperanto perdos sian internaciecon. Sed bv. atenti ĵenan konsideron. Multaj grandaj ideoj komencis disvastiĝi en konkreta lando, sed oni ne plu ligas tiujn ideojn al tiuj landoj. Finfine la tuta mondo iĝos lingvujo de E-o (do, Esperantujo), sed ne la tuta mondo samtempe. Pri la cetero mi konsentas, kaj nur deziras aldoni ke la fina venko okazos plej verŝajne per referendumoj.

Aleksandr Fiŝkin - Rusio

Vigla vendado maltrankviliga

Osmo Buller

Dank' al la grandega UK kaj vigla eldona aktiveco de UEA mem, la Libroservo de UEA saldis siajn vendojn en 1998 per la impona sumo de 297 165 gld.

Tio estas 14% pli ol en 1997 (260 378 gld.) kaj 10% pli ol kuraĝis esperi la buĝeto (270 000 gld.). Ŝajnas do ke la librolando Esperantujo fartas bone: en la 80-aj kaj 90-aj jaroj nur unufoje, en 1988, la rezulto estis eĉ pli bona, 365 935 gld. La tiama rev-rezultado eblis pro koincido de tri faktoroj. La ĉefa vendo-ondo de la eldona rikolto de la Jubilea Jaro ruliĝis en tiu posta jaro, des pli ĉar jarkomence aperis nova librokatalogo. Krome, la UK okazis en Roterdamo. Normale UEA povas porti al UK maksimume kvaronon de la tuta sortimento de sia libroservo, sed en Roterdamo ĉio estis aĉetebla. Ju pli riĉas la oferto, des pli multas la vendoj. Tion montras la Malfermaj Tagoj de la CO, dum kiuj cento da klientoj aĉetas tiom kiom oni vendas dum unu tago en UK.

La lastaj jaroj estis bonaj por nia libroservo. Tio rezultis unuavice el ĝia pli efika organizo i.a. per la Malfermaj Tagoj kaj regulaj ofertoj al diversaj celgrupoj. Eblus eĉ pli da vendoj, se la ĉiama manko de laborforto ne prokrastus aperigon de aktuala katalogo.

Rande de senhelpeco

Pri merkato niaj eldonistoj ne meritigas laŭdon. Ĉi-kampe iliaj pasiveco kaj amatoreco randas senhelpecon. Ili ne vidas la neceson akceli la vendojn per reklamoj, precipe en *Esperanto* kaj la Jarlibro, la senkompare plej grandaj E-eldonaĵoj. Sajn varojn ili limake liveras por vendado. Iuj eldonistoj eĉ kvazaŭ ĵaluze retenas siajn varojn anstataŭ cedi ilin al klientoj. Ekz. kelkaj el la "novaĵoj" de la ĉi-numera "Laste aperis" atingas la ĉefan merkaton kun

malfruo de tuta jardeko! Titoloj pli freŝaj eniras la rubrikon ofte ne pro tio ke la eldonistoj meminiciate sendis ilin al UEA tuj post apero, sed pro aktiva spurado de UEA.

La vendokresko kaŝas ankaŭ degeneron aŭ eĉ malaperon de lokaj kaj landaj libroservoj. Parto de iliaj klientoj bonŝance trovas la vojon al UEA, kies rapidan kaj kompetentan servon ili aprezas. Landaj asocioj devus konsideri libroservon same baza kondiĉo de serioza agado kiel propra gazeto.

Resume: malantaŭ bona rezulto kaŝiĝas ankaŭ maltrankviligaj fenomenoj. La totalaj vendoj sur la E-merkato sendube malkreskis ankaŭ en 1998, unuavice pro tio ke la esperantistaro ja ŝrumpas en pagipovaj landoj, kie la merkato plejparte troviĝas.

Jen ĉi-sube du statistikoj de la plej furoraj titoloj. Unu montras la totalajn vendojn (ĉefe al aliaj libroservoj); la alia la nombron de unuekzempleraj aĉetoj (ĉefe de individuaj klientoj). La totalaj vendoj inkluzivas la unuopajn vendojn. La libroservo vendis entute 15 878 ekzemplerojn de 1853 libroj, diskoj aŭ kasedoj, apud amaso da diversaĵoj, t.e. insignoj, skribiloj ktp. ★

VENDOJ ENTUTE

ekz.	titolo	prezo (€)
360	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> , gvidilo	3,00
347	<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj	10,90
247	<i>Al lingva demokratio</i> , red. M. Fettes kaj S. Bolduc	10,20
242	<i>Saluton!</i> , lernolibro de A. Childs-Mee	10,90
199	<i>Internacia Kongresa Universitato 1998</i> , prelegaro	8,15
162	<i>Terminologia gvidilo</i> , H. Suonuuti	5,45
160	<i>Monumente pri Esperanto</i> , H. Röllinger	8,15
137	<i>Pajleroj kaj stoploj</i> , W. Auld	19,05
131	<i>Faktoj kaj fantazioj</i> , M. Boulton	16,35
130	<i>Esperanto post la jaro 2000</i> , A. Korĵenkov	2,15
121	<i>Kio ni estas kaj kion ni celas*</i>	—
114	<i>Ili vivis sur la tero</i> , M. kaj B. Robineau	20,40
95	<i>Tendaraj tagoj I</i> , S. MacGill	5,45
92	<i>Diccionario de bolsillo...</i> vortaro, J. Paluzie-Borrell	6,10
87	<i>Klara vortaro Esperanta-araba</i> , G. Abraham	13,60
86	<i>Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj</i> , L. Levin	10,90
83	<i>Dictionnaire de poche / Poŝvortaro</i> (franca-E-franca)	5,45
81	<i>Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj</i> , Goscinny/Uderzo	9,00
81	<i>Plena analiza gramatiko de Esperanto</i> , K. Kalocsay kaj G. Waringhien	21,80
73	<i>Kulturo kaj teknologio</i> , A. Urevbu	6,80

*Provizora broŝuro. Ĵus aperis nova, ilustrita eldono (vd. p. 55).

UNUOPAJ VENDOJ

ekz.	titolo	prezo (€)
61	<i>Al lingva demokratio</i> , red. M. Fettes kaj S. Bolduc	10,20
51	<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj	10,90
50	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> , gvidilo	3,00
45	<i>Tien</i> , J. Valano	10,20
42	<i>Esperanto post la jaro 2000</i> , A. Korĵenkov	2,15
40	<i>Terminologia gvidilo</i> , H. Suonuuti	5,45
35	<i>Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj</i> , L. Levin	10,90
34	<i>Pajleroj kaj stoploj</i> , W. Auld	19,05
33	<i>La manto</i> , P. Mährti	14,95
32	<i>Zamenhof kaj judismo</i> , A. Cherpillod	8,15
31	<i>Faktoj kaj fantazioj</i> , M. Boulton	16,35
31	<i>Saluton!</i> , lernolibro de A. Childs-Mee	10,90
30	<i>Monumente pri Esperanto</i> , H. Röllinger	8,15
27	<i>Antologio latina I-II</i> , G. Berveling	33,00
26	<i>La bona lingvo</i> , C. Piron	12,00
26	<i>Kulturo kaj teknologio</i> , A. Urevbu	6,80
26	<i>La reveno de la reĝo</i> , J.R.R. Tolkien	19,05
25	<i>Nederlands-Esperanto-Nederlands</i> , vortaro de A.J. Middelkoop	11,55
24	<i>Saluton!</i> (kasedo al la lernolibro)	5,45
23	<i>La ĉashundo de la Baskerviloj</i> , A.C. Doyle	8,15
23	<i>Amparolo</i> , I. Nemere	5,70

Laste aperis



Almanako Lorenz 1999. N-ro 19. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1999. 111p. 21cm. Artikoloj, eseoj kaj poemoj spiritismaj. € 4,50.

Asiriaj leĝoj. Trad. Tom Arbo Höeg. Oslo: Studenta E-Societo, 1988. 62p. 21cm. Dulingva. Leĝotekstoj el ĉ. 1400-1100 a.Kr., trovitaj sur tabuloj en Qal'at Šerĝat (la malnova Assur). € 4,80.

Berlino por turistoj. *Praktika poŝgvidilo por esperantistoj.* Ulrich Becker (1958). Fotoj de Ingo Knechtel. Berlin: Mondial, 1999. 52p. ISBN 3 9805763 3 7. 15cm. Helpilo por orientiĝi en la kongresurbo. € 2,60.

Eszperantó-magyar és magyar-eszperantó szótár (szójegyzék). *Tanfolyamok, magántanulók és az iskolai oktatás részére.* László Szilvási (1957). Budapest: Lingvo-Studio/Kulturális Eszperantó Szövetség, 1998. 171p. ISBN 963 03 6191 4. 16cm. Dudirekta vortareto hungara, kun po 3700 kapvortoj. € 10,90.

Jubilee (1924). Vladimir Majakovskij (1893-1930). El la rusa trad. Nikolaj V. Lozgačev. Svislando: LF-Koop, 1988. 12p. 21cm. Poemo verkita por la 125-a jubileo de la naskiĝo de Puŝkin. € 2,70.

Kio ni estas kaj kion ni celas. *Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto.* Red. Renato Corsetti kaj Osmo Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 24p. ISBN 92 9017 061 1. 30cm. Sep fakuloj esee komentas la sep punktojn de la Praga Manifesto. € 5,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Konto de l' vivo. Paul Gubbins (1949). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1998. 139p. ISBN 90 71205 76 2. 21cm. Kvar unuaktaĵoj jen seriozaj jen farsaj, el kiuj du premiitaj en Belartaj Konkursoj. € 12,90.

Language Minorities and Minority Languages in the Changing Europe. Red. Brunon Synak, Tomasz Wicherkiewicz. Gdańsk: Uniwersytet Gdańsk, 1997. 419p. ISBN 83 7017 772 7. 24cm. Plejparte anglalingva. Kvardeko da prelegoj el la 6-a Internacia Konferenco pri Minoritataj Lingvoj (Gdańsk,

Dulingva: E-portugala. Poemaro "en du voĉoj", en la lingvoj patrino kaj homaro. € 6,90.

Sepkapa feino, La. *Dudek du groteskaj, modernaj fabeloj* (1973). Ervin Lázár (1936). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Debrecena Bulteno, 1998. 60p. 21cm. € 3,90.

Slango kaj jargono en Esperanto. *Provizora privata listo de slango kaj jargono (kaj aliaj ne-PIV-aj signifoj).* Wouter F. Pilger (1942). Debrecen: Debrecena E-Societo, 1998. 40p. ISBN 963 03 6618 5. 21cm. Milo da kapvortoj. € 3,90.



Ŝtona urbo, La. Anna Löwenstein (1951). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 350p. ISBN 90 71205 77 0. 21cm. Romano. Juna keltino en la unua jc. de nia epoko konatiĝas kun Romo kaj fruaj kristanoj. € 22,70.

SONKASEDO
Muzika Literatura Mondo. K. Kalocsay / J. Baghy. Kantas M. Sárossy, G. Molle, V. Damjanov k.a. Svislando: LF-koop, 1991. 23 min. 9 poemoj muzikigitaj. € 15,60.

VIDBENDOJ
Babel'. *Unua sciencofikcia filmo en Esperanto* (1988). Yvon Davis. Francio/Svislando: CDN Productions/LF-koop, 1993. 40 min. PAL. Kun franclingvaj subtitoloj. En proksima estonteco, en mondo manka je komunikado, patron kaj filon disigas malfacile trapasebla rivero. € 39,90.

Kiam Parizo estis Parizo ankaŭ por ni esperantistoj. *Muzika videbendo originala en Esperanto.* Kantas Nicole Pairoux. Svislando: LF-koop, 1989. 29 min. PAL. Klasikaj francaj kanzonoj, kun Nikolaj kaj kun Parizaj vindindaĵoj kiel fono. € 66,00.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!




Lastege aperis: ĉiuj tri volumoj atingis nin la lastan tagon antaŭ finredakto.

1996). Kun kontribuo de Hans Erasmus pri "E-o kiel dua lingvo apud la denaska". € 18,00.

Malkovro de Ameriko, La (1893). Cesare Pascarella (1858-1940). El la itala trad. Gaudenzio Pisoni, Carlo Minnaja, Renato Corsetti. Editoris Perla Martinelli. Svislando: LF-Koop, 1992. 24 (ne num.) p. 21cm. La farto de Kolumbo, rakontita en 50 inĝeniaj sonetoj. € 7,90.

Pluraj vibroj / Vibrações plurais. Dokito (Manoel Borges dos Santos, 1926). Salvador: Imagem Produções, 1998. 80p. 21cm.



Laste reaparis

Festu Tinĉjon 70-jaran!

De kiam la detektiveto debutis en 1929, vendiĝis milionoj da Tinĉjo-bildstrioj en pli ol 32 lingvoj. La du Esperantajn titolojn oni jam kredis elĉerpitaj, sed nia Libroservo akiris stokon de La nigra insulo; ĝi estas nun ties ĉefa distribuanto.

La nigra insulo. Hergé. Trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62p. 30cm. € 10,00.

Kaj blue...



BELGIO: Barĝo kaj eŭro

• Asocio por Esperanto, la valonia branĉo de Belga Esperanto-Federacio, ĉeestis la Feston de Lingvoj (13-14 nov.) en Charleroi, aranĝitan sur la rivero Sambre, sur barĝo. Ĉi tiun sekvis simila Festo en Antverpeno, kie la organiza stafeto iĝis Flandra E-Ligo. (*Inter ni*)

• La 16-an de jan. aktivuloj el Oostende, Flory Witdoeck kaj Germain Pirlot, estis intervjuitaj en la loka gazeto *Het Volk*. (*Mal-longe*)

• Bulteno de Promeuro, "civitana asocio por la antaŭenigo de eŭropa mono", reprenis E-

lingvan bildkarton, senditan en 1934 el Rumanio, kiun la asocio taksas "la unua civitana alvoko por komuna eŭropa mono". Maurice Wouters, kasisto de la valonia E-asocio, dissendis kopi-on el la bulteno al deko da regionaj ĵurnaloj. Rezulte, aperis en *La Meuse - Namur* (6 feb.) granda, pozitiva artikolo intervjuata, kun fotoj, pri la 79-jara Wouters, "pasia e-isto". (M. Wouters)

BRITIO: BBC Zamenhof-tage

La 15-an de dec., plurfoje en la mateno, la tutmonda servo de BBC elsendis kvinminutan programon pri Esperanto en Pollando. Post la enkonduka frazo "la internacia lingvo Esperanto povus ankoraŭ revigliĝi", oni aŭdis i.a. la voĉojn de Andreo Pettyn kaj de Seán Ó Riain, irlanda vic-ambasadoro en Varsovio, dumviva membro de UEA. (J. Rapley, R. Rotsaert)

KRISTOĈJO: Knabo tute ne freneza

Festinte sian 11-an naskiĝtagon la 18-an de januaro, la brazila knabo Kristoĉjo Resende (surfote) tuj ekhavis multon por fari la postan tagon. Li devis aperi en prestiĝa televid-programo de Jô Soares por intervjuiĝi kune kun la fama aŭtoro Ziraldo, kies libron *O Menino Maluquinho* ("La knabo frenezeta") li esperantigis. Koincide, la revizianto redonis al Kristoĉjo samtage la korektitan manuskripton de lia sekva Ziraldo-traduko, *Flicks*, kiun la giganta eldonejo Melhoramentos lanĉos venontan majon en la internacia librofoiro de San-Paŭlo.

Post la intervjuo, la brazila Esperanto-kurso Interreta (<http://aleph.com.br/kce/cer.htm>) ricevis 380 petojn de la unua leciono, anstataŭ la kutimaj po 4 tage. Kristoĉjo mem ricevis multajn ret-mesaĝojn kaj centojn da vizitoj ĉe lia <http://pagina.de/knabo>. Kaj ne ĉesis la intervjuoj gazetaj kaj televidaj. Ni menciuj tiujn en suplemento de *Gazeta Mercantil* (25 jan.; <http://www.gazeta.com.br>) kaj sur unua paĝo de la ĵurnalo *Correio Braziliense* (28 jan.; <http://www.geocities.com/EnchantedForest/6464/gazeta.html>).

Laŭ *Correio*, Kristoĉjo estas normala knabo (160 cm, 42 kg), kiu ŝategas matematikon, ne eltenas la portugalan ("mi estas pigra skribi") kaj revas fariĝi sciencisto ("por inventi grandajn aferojn"). (R. Resende, *Correio Braziliense*)

ĈINIO: Poeta instigo

La Esperanta poeto Lu Jixin estis intervjuita la 14-an de nov. dum 40 minutoj ĉe la Guilin-a Popola Radio de Guangxi. Post la programo venis leteroj de dezirantoj lerni E-on. (*El Popola Ĉinio*)



KROATIO: Denove televide


• La 18-an de feb. la prestiĝa programo "Duonhoro da kulturo" dediĉis 7 minutojn al E-o, okaze de la 25-jara teatra E-aktivado de Vida Jerman. Krom ŝi oni aŭdis akademianon Dalibor Brozović, la popularan literaturkritikiston Igor Mandić kaj,

FRANCIO: Du vesperaj horoj

Ĉe la radio France Inter, en la regula vespera elsendo Zinzin, dum preskaŭ du horoj temis pri Esperanto la 13-an de januaro. Invititaj estis Philippe Berizzi, prezidinto de Junulara E-ista Franca Organizo, kaj la konata franca lingvistino Henriette Walter, kiu parolis fake kaj apreze pri Esperanto. (F. Berthelot)

JAPANIO: Pri Lipari en Tokio

Pariza korespondanto de la japana ĵurnalo *Tōkyō Tyūniti Sinbun*, USUDA Nobuyuki, intervjuis la ĝeneralan sekretario de UEA, Michela Lipari, pri la rolo de E-o en Eŭropa Unio kaj en la strebo al paco. La teksto aperis, kun foto, la 17-an de nov. (M. Lipari)



Francjo Veuthey

RUSIO: Poezia prefero

La 25-an de nov. ĉe televid-kanalo Moskva intervjuiĝis (3 min.) Valentin Melnikov, kiu klarigis kial li verkas poezion prefere Esperante ol ruse, kaj laŭtleĝis unu sian poemon. (La Ondo de E-o)




Nikola Rašić
en *Novi List*

kiel solan nefavoranton de Esperanto, la poeton Slavko Mihalić. Filmo de Kruno Tišljar montris familian uzon de E-o. (S. Štimec)

- La gazeto *Novi List* publikigis (9 jan.) tutpaĝan intervjuon kun Nikola Rašić, titolitan "Esperantistoj ne estas obstinaj naciistoj". (N. Rašić)

Esperantistaj retadreso 1993-1999



INTERRETO: Senrompa kresko, baldaŭ 2500 retadreso

Laŭ statistiko de Derk Ederveen, la kvanto de esperantistaj ret-uzantoj kreskas laŭ senrompa linio. Jen la ciferoj pri la konataj retadreso de esperantistoj:

Je 11 feb. 1993: 310 adresoj de 219 personoj el 26 landoj. 67 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj, kaj 18 internaciaj. **Je 1 jan. 1994:** La koncernaj ciferoj estas respektive: 528, 364, 37, 125 kaj 28. **Je 1 jan. 1995:** 688, 485, 44, 174, 36. **Je 1 jan. 1996:** 876, 624, 50, 191, 42. **Je 1 jan. 1997:** 1255, 959, 61, 265, 55 (hejmpaĝoj: 181). **Je 1 jan. 1998:** 1781, 1321, 65, 355, 65 (hejmpaĝoj: 339). **Je 1 feb. 1999:** 2417, 1694, 71, 426, 76 (hejmpaĝoj: 438). Versajne, kiam vi legos tion ĉi, la nombro de ret-uzantaj esperantistoj estos jam atinginta 2500.

RUMANIO: Oneț por hejma publiko

En la urbo Cluj, la semajna gazeto *Informația Cluj* (plurdek mil ekz.) tutpaĝe intervjuis (15-21 dec.) la poeton-eldoniston-

oficiston Ionel Oneț, originan el la Kluĵa regiono, kiu jam la dekan jaron laboras en Usono kiel vicdirektoro de la Centra Oficejo de ELNA. (*EsperantoUSA*, I. Oneț)

TUTMONDE: Demando en Time

En la tutmonde legata magazino *Time* aperis la 1-an de feb. letero de Paul Hewitt (delegito en Grimsby, Britio): "Jen venis eŭro por solvi la valuto-pro-

blemon; ni bezonegas similan solvon por la lingvoproblemo. Kiam politikistoj serioze ekdebatos pri la nuna haosa, malefika kaj nedemokratia situacio kaj alprenos Esperanton?" (P. Hewitt)



ĈU ZAMENHOF MALAPERU EL BĴALISTOKO?

"Ni, geinstruistoj de la Elementa Lernejo n-ro 23 je la nomo de Ludoviko Zamenhof en lia naskiĝurbo, Bjalistoko, ekzistanta de la 1959-a jaro (...) petas vin helpi savi nian lernejon. (...) nia direkto kaj la estraro de la Bjalistoka komunumo decidis likvidi nian publikan lernejon kaj transdoni nian sidejon al privata, romkatolika lernejo. Ni opinias ke en la

naskiĝurbo de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto ne povas malaperi la sola lernejo portanta la nomon de tiu fama bjalistokano."

Jen parto de alvoko "al geesperantistoj de la tuta mondo", dissendita la 23-an de februaro.

Nia redakcio povas nur aliĝi al la peto disvastigi ĉi tiun informon kaj sendi protestleterojn al la urbestro de Bjalistoko: S-ro Ryszard Tur, city@cksr.ac.bialystok.pl (kopie al la lokaj e-istoj, ĉe spnr23@polbox.com), aŭ pere de Fondaĵo Zamenhof (ul. Piekna 3, PL-15-282 Białystok). Estas rekomendinde skribi ankaŭ al diplomaciaj reprezentantoj de Pollando, kiel jam faris, inter la unuaj, Vincent Charlot (Francio).



AULD: Ruso pilgrimis

Inter la 12-a kaj 19-a de februaro la ruslanda eldonisto Aleksander Korĵenkov (40-jara, redaktoro de *La Ondo de Esperanto*, vd. jan., p. 10) helpe de FAME-Fondaĵo vizitis Brition. Li prelegis pri Tolkien kaj Esperanto en la Londona Eklubo kaj pasigis kelkajn tagojn en Skotlando, kie li renkontiĝis kun William Auld cele al eldono de biografio je ĉi ties 75-jara jubileo, fine de 1999. Intertempe okazis la oficiala kandidatigo de Auld al la literatura Nobel-premio (vd. sep. '98, p. 161), laŭ atesto de kvarlingva konfirmo el Svedio pri la ricevo de la kandidatiga letero. (A. Korĵenkov, G. Berveling)

DREES: Ŝtatviro jarcenta

La ŝtatisto Willem Drees (1886-1988) estis deklarita "la nederlanda politikisto de la jarcento". Ĉefministro de 1948 ĝis 1958, la socialdemokrata politikisto — karesnomata "paĉjo Drees" — kvazaŭ personigas la rekonstruon kaj refortiĝon de Nederlando post la dua mondmilito. Esperantisto, pli ol 50 jarojn Drees



Willem Drees

membris en Asocio de Laboristaj Esperantistoj, estis Alta Protektanto de la 39-a UK (Haarlem, 1954) kaj dum multaj jaroj ano de la Honora Patrona Komitato de UEA.

FIEDLER habilitiĝis

Pli kaj pli ofte oni doktoriĝas per disertaĵoj pri interlingvistikaj aŭ Esperanto-rilataj temoj. Pli alta universitata grado en kelkaj eŭropaj ŝtatoj, rajtiganta i.a. al universitata instruado, estas la t.n. habilitiĝo. Ĉi tiun gradon atingis la 29-an de jan. d-rino Sabine Fiedler (41-jara), anglisto en la Universitato de Lepsiko (Germanio) kaj esperantologo, per elstara germanlingva disertacio 400-paĝa, aperonta ĉi-jare kiel libro: "Planlingvo kaj frazeologio: Empiriaj esploroj pri reproduktita lingvo-materialo en Esperanto". Inter la kvin oficialaj ekspertizantoj troviĝis Detlev Blanke. Sian frazeologiajn esplorojn Fiedler plenumis i.a. mendante dissendon de enketilo kun numero (apr. '95) de nia revuo. (D. Blanke)

SMIDÉLIUSZ: Honorigo en Hago

Katalin Smidéliusz (41-jara) fariĝis "honora kunlaborantino" de In-



Kaj tuj ni, kara mia,
unu grandan son

CSEH: 20 jarojn senmorta

Antaŭ 20 jaroj, la 9-an de marto 1979, forpasis la granda lingvopedagogo Andreo Cseh (1895-1979), la patro de la epokfara Ĉe-metodo. Por tiu jubileo Roberto Resende el Brazilo inaŭguris TTT-paĝon ĉe <http://www.geocities.com/Athens/Parthenon/1464/cseh.html>, el kiu ni citas:



Andreo Cseh

"Kara abonanto, bedaŭrinde ni ne povas plenumi vian peton skribi vian novan adreson sur vian postajon, sed se vi aldonas la malgrandan supersignon sur la literon s, ni plezure plenumos vian peton!" (A. Cseh). Daŭre haveblas *Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh* (1995), red. de Katalin Smidéliusz (128p, € 10,20).

ternacia Esperanto-Instituto pro sia plurjara, konstanta kaj harmonia kunlaboro kun IEL, senlaca instruado laŭ la Ĉe-metodo kaj fruktodonaj esploroj pri la vivo kaj agado de Andreo Cseh.

La 28-an de dec. ŝi ricevis de IEL-prezidanto Ed Borsboom, dum bankedeto en Hago, arĝentan stel-medalon kaj diplomon. Ĉeestis la intiman solenaĵon ŝia edzo Kálmán, la direktoro de la IEL-oficejo, Atilio Orellana Rojas, kaj la IEL-estranaroj. (Estraro de IEL)

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Leonardo Ramalho. Francio: Eugène Papciak. Irlando: Seán Ó Riain. Usono: Stewart Moore.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Aŭstralio: Owen Loneragan; Stan J. Bruton. Meksiko: Julie L. Regal. Usono: Antonio Gomez; Steven E. Sorenson. AMIKOJ (minimumo \$10): Usono: Thomas Leong; Pierre C. Jelenc; Pauline Ledeen; Ronald J. Glossop. ALIAJ: Usono: L.M. Gregg; J.R. Vazquez.

PATRONOJ DE TEJO 1999

Brazilo: Marija Pozder Almada. Finnlando: Päivi Saarinen. Francio: Alain Pialla; Gaston Fournier; Henri Roy; Frato René-Jean Marmou; Bert Huet-Schumann; Laurent Vignaud; Pierre Lelièvre. Hungario: Péter Pál Denke. Japanio: Takasi Kawai. Nederlando: F.J. Pieterse-Kruger; Miny Massar-van Diepen. Usono: D. Gary Grady; James R. Cöliz Jr.; R. Paul Lynch; L.A. Walther.

SOCIETO ZAMENHOF 1999

Aŭstralio: Jean A. Lehane; Stan J. Bruton. Brazilo: Gilbert René Ledon; Symilde Schenk Ledon; Marija Pozder Almada. Francio: Féodor Jelenc; Henri Roy; Jeannine Vincent; Tadeusz Nowak; Raymonde Pérault. Germanio:

Albrecht Kronenberger; Marieta Moschner. Hispanio: Josep Franquesa Solé. Hungario: Péter Pál Denke. Kanado: Marijke Meijer. Meksiko: Julie L. Regal. Nederlando: Mag. G.F. Makkink; P.H. Damsté; Miny Massar-van Diepen. Svedio: Gunnar Olsson; Malte Gahlin. Usono: Christopher Culver; Doris Vallon-Wheeler; D. Gary Grady; Gigi Harabagiu; Margaret L. Barkley; Milton O. Brown; Robert A. Swenson; William Keith Bledsoe. Venezuelo: Juan Eduardo Bachrich.

DONACOJ 1999 (EUR) ĝis la 28-a de februaro

Fondaĵo Afriko: Nov-Zelando: T. Jansen 4,67. Sumo ĉi-jara: 4,67.



per Esperanto faru
don familian!"

PEYNET: Dediĉo al rondo familia

"Kaj tuj ni, kara mia, per Esperanto faru 'unu grandan rondon familian'!" Laŭ amika instigo de la esperantistino Marie-Thérèse Boiton, la franca desegnisto-poeto Raymond Peynet (1908-1999, mortinta en januaro) verkis ĉi tiun poŝtkarton por la esperantistoj kaj dediĉis ĝin propramane, laŭ traduko per kiu provizis lin Jean Thierry. "La geamantoj" de Peynet, kiujn li desegnis ekde 1943, fariĝis emblema bildo en Francio kaj inspiris al Georges Brassens la kanzonon kiun Jacques Yvart kantas Esperante kiel *La geamantoj sur la verda benk'*. Ĵurnalisto Michel Vincent nekrologis jene pri Peynet en la gazeto *Le Pays Briard* (19 jan.): "ne ĉiuj artistoj kaj verkistoj ridetas skeptike kaj kun humiliga degno pri Esperanto, kiel faras la plej multaj amas-informistoj, pli trafe nomeblaj mis-formistoj..." (M. Sujet)

40-JAROJ DA ESPERANTO ĈE POLA RADIO



Lige al la 40-jara jubileo de la E-lingvaj elsendoj de Pola Radio, la E-Redakcio reaŭdigas interesaĵojn el la pasintaj 40 jaroj. Post marta elsendo de intervjuaro kun Ada Fighiera, en aprilo sekvos intervjuoj kaj parolad-fragmentoj de Ivo Lapenna, Julio Baghy, Kolomano Kalocsay k.a.

De 28 marto Pola Radio iom ŝanĝos sian programskemon. Tre verŝajne la tuta duonhora elsendo inkluzive de E-ekspreso, leterkesto kaj aliaj E-temaj programeroj estos aŭdigata per Real Audio, kondiĉe ke oni trovos taŭgan servil-posedanton. (A. Pettyn)

Fondaĵo Azio: Japanio: Y. Hayakawa 14,90; M. Hirotaka 15,16; Y. Hotta 14,90; M. Isino 14,91; Y. Itou 29,81; E. Kimura 15,16; H. Kumaki 14,90; H. Kuriyama 14,90; Y. Kuroyanagi 15,16; Y. Misawa 29,81; T. Nakamiti 14,90; A. Saiki 15,17; T. Saitou 37,91; R. Sasaki 15,16; H. Tani 15,16; T. Taniguti 30,33; H. Todoroki 14,90; M. Toyoda 30,33. Sumo ĉi-jara: 353,47.

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: A. J. Bishop 22,69. Francio: F. Bartsch 15,24; J.-F. Clet 28,97; R. Despujols 45,73; R. Gonin 45,38; P. Hamon 4,57; C. Haren 19,06; J.A. Metzeler 4,57; B. Robineau 41,92; A. Tailpied 22,87; J.C. Trebouet 15,24. Irlando: M. Mullarney 22,69. Luksemburgio: B.R. Moon 45,38. Nederlando: R. Slot 136,13. Svislando: R. Ernst 0,46. Sumo ĉi-jara: 470,90.

Fondaĵo Grabowski: Norvegio: E. Matland 11,34. Sumo ĉi-jara: 11,34.

Junulara Fondaĵo: Germanio: B. Maurer 51,13. Francio: C. Bros 3,63. Britio: K. Gilmore, 24,00. Nederlando: J. Witteveen 4,12; F.D. van Zoest 11,34. Sumo ĉi-jara: 94,22.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: A. J. Bishop 22,69. Svislando: R. Ernst 0,45. Germanio: M. Westermayer 9,07. Britio: R. Lynn 12,87. Luksemburgio: B.R. Moon 45,38. Nederlando: Y. Weidema 45,38. Sumo ĉi-jara: 135,84.

Volontula Fondaĵo: Germanio: M. Westermayer 9,08. Francio: F. Bartsch 9,91. Japanio: S. Takizawa 2,16. Luksemburgio: B.R. Moon 65,80. Nederlando: Y. Weidema 34,03. Ruslando: N. Nikulina 9,08. Sumo ĉi-jara: 130,06.

Kampanjo 2000: Argentino: R. Calógero 11,34. Aŭstralio: R. Harry 11,35; T. Metherall 11,34. Brazilo: A. Rabêlo 11,35. Kanado: M. Meijer 22,68. Finnlando: R. Pyhälä 11,35. Svedio: T. Jansson 11,35. Nederlando: P.H. Damsté 90,75. Sumo ĉi-jara: 181,51.

Ĝenerala Kaso: Germanio: M. Könen-Bergmann 3,58. Nederlando: A.W. Treurniet 47,65; F.D. van Zoest 22,68. Usono: W.K. Bledsoe 70,98; A. Gomez 44,37; T.H. Goodman 35,49; D.C. Halley 88,73; P. Jelenc 8,87; S. Slak 17,75; S.E. Sorenson 22,18; A.M. Steffes 21,30; J.R. Vazquez 8,87. Sumo ĉi-jara: 392,45.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

REINHARD HAUPENTHAL informas pri nova adreso: B.P. 19, FR-84340 Malaucène, tel./fakso: +33.(0)4.90.65.28.33.

TIUJN KIUJ NASKIĜIS LA 22-AN DE NOVEMBRO 1933 (22.11.33), mi invitas al festo, okaze de la 66-a naskiĝtago. Vian reagon volonte atendas Franz Trachsel, Benziwil 25/55, CH-6020 Emmenbrücke, centra Svislando.

ĈIUJ INFORMOJ estas bonvenaj pri la belga esperantisto Richard Corveleyn, partopreninta en la kongreso 1960 en Bruselo. Poul Kry Poulsen, Benløseparken 19, 1 th, DK-4100 Ringsted, Danio.

26 GEKNABOJ 9-JARAJ uzus E-on pontlingve por komputile korespondi kun geknaboj tutmonde pri la taga vivo: La Bulle Bleue, Ecole Rabelais, FR-37400 Amboise, Francio; ☐a.reto@france-association.com.

TREJNISTO DE VELADO, gvidanto de kurac-gimnastiko serĉas anojn de similaj profesioj. 47-jara, ne fumas, ne trinkas. Wiesław Michalak, PL-20607 Lublin, Wallenrode 7/43, Polando.

NOVA ADRESO de d-ro P.V. Ranganayakulu: 4, J.O.Q., TTD Quarters, K.T. Road, Tirupati 517 501, Andhra Pradesh, India/Barato; ☎+91/(0)8574/32-242.

EN LA MONTARA CENTRO de Argentino, Teresita Alaniz kaj Gustavo Tomás malfermis hotelon / Esp.-kulturejon: Calles El Ombú y Los Cedros, AR-5881 Alpa Corral, Argentino; ☎+54/58/88-120; ☐+54/58/888-100 kaj +54/1/952-37-80.

PRI TURISMO interesiĝas Viktor Vasiljev (Ul. Gastello 4-36, RU-600026 Vladimir, Ruslando), kiu serĉas plumamikojn tutmonde.

Jean CLEMENT (1908-1998), iama delegito pri naturprotektado, mortis en januaro 1998 en Vierzon (Francio).

Guy DELAQUAIZE (1921-1998), iama komitatano de Internacia Fervojista E-Asocio kaj redaktoro (1974-82) de *Internacia Fervojisto*, kiu vicprezidis (1960-62) kaj prezidis (1962-68) Francan Fervojistan E-Asocion, mortis la 29-an de septembro en Carrières-sur-Seine apud Parizo.

Madeleine GIBEZ (1902-1998), iama delegitino en Gargas (Francio) kaj pri turismo, mortis la 9-an de decembro.

Willy VILDEBRAND (1904-1998) mortis la 27-an de junio en Lepsiko. Li prezidis Germanan Laboristan E-Asocion de 1930 ĝis ties disbato en 1933, kaj denove aktivis post la repermeso de E-o en GDR (1965).

J. de VRIES (1907-1999), dumviva membro, forpasis la 16-an de januaro en Scheemda (Nederlando).

Gustav KÜHLMANN (1912-1999), Honora Membro de UEA ekde 1988, forpasis en Kopenhago (Danlando) la 28-an de januaro.

Gustav Kühlmann naskiĝis en Danio la 8-an de aŭg. 1912. Li ekstudis E-on meze de la 30-aj jaroj, kaj en 1944 fariĝis prezidanto de Konversacia E-ista Klubo Kopenhago — posteno kiun li okupis plurfoje, dum jardekoj.

Lian organizan talenton laŭdas i.a. la postkongreso de la UK en Malmö (1948) kaj du UK-oj en Kopenhago

Eva SEEMANNOVÁ (1920-1999), Honora Membro de UEA ekde 1996, forpasis la 21-an de januaro.

Profesia aktorino, Seemannová fariĝis tutlande konata prezentanto de unuaktoriaj verkoj post kariero en teatro migranta kaj en Pragaj teatroj. Lerninte Esperanton en 1946, ŝi gvidis Cseh-kursojn en multaj lokoj kaj en someraj E-kolegioj. Inspirite de Baghy, ŝi fondis en 1954 la trupon La Verda Ĉaro de Julio Baghy (1954-59), kies plej granda suk-



Petro Chrdle

ceso estis *Pigmaliono* de G.B. Shaw, prezentita i.a. en la Varsovia UK (1959). Famaj plenumoj estis *Legendo pri amo* de Nazim Hikmet, kiu mem ĉeestis la premieron, *Patri-no* de Čapek, *Nora* de Ibsen kaj *Maryša* de fratoj Mrštík. Ŝi mem tradukis dramojn por la trupo, kaj ĉefrolis en ĉiu el ili. Post ties disfalo ŝi revenis al unuaktoriaĵoj. Ŝiaj poemoj aperis en Esperantaj gazetoj, plurfoje ricevis premiojn en Belartaj Konkursoj, kaj du el ili troviĝas en *Esperanta antologio*.

Ye Junjian (ps. Cicio Mar, 1914-1999), pioniro de la ĉina E-movado, honora prezidanto de Ĉina E-Ligo, vicprezidanto de la societo Amikoj de Esperanto, konsiliano de *El Popola Ĉinio*, komitatano (1980-

1956, 1975), kies LKK-estro li estis. Kiam en 1974 al UEA mankis kongresurbo por la sekva jaro, li elpaŝis en la fermo de la Hamburga UK per pretekdeklaro de Kopenhago.

Ekde 1979 li estris la asocion Internacia Aŭtomobilista E-Klubo.

Membro de UEA ekde 1945, dum multaj jardekoj li servis kiel komitatano (1951-83). Kiel loka delegito, ĉiam en la sama urbo,

li eble atingis mondrekordon: de 1946 li plenumis vicdelegitan, ekde 1950 delegitan funkcion en Kopenhago.



Arkivo de UEA

92) de UEA, mortis en Pekino la 5-a de januaro. Li estis i.a. ano de la ĉina parlamento, vicprezidanto de Ĉina Tradukista Asocio kaj de la PEN-Centro de Ĉinio, konsiliano de Ĉina Verkista Asocio.

La unua novelo (*Je la jarfino*, 1932) de Ye Junjian, kiu iĝis unu el la plej konataj verkistoj kaj tradukistoj de Ĉinio, naskiĝis en Esperanto, jaron post kiam li lernis la lingvon. En 1935 li verkis la rakontojn de la kolekto *Forgesitaj homoj* (1937, 1985). Li estis la sola ĉina aŭtoro kapabla verki ankaŭ angle kaj Esperante. Konante pliajn ses lingvojn, dum pli ol kvarona jarcento li redaktis la monatan revuon "Ĉina Literaturo" en la angla kaj franca. Li ĉinigis verkojn de i.a. Andersen, Eŝilo, García Lorca, Maeterlinck, Mérimée kaj Tolstoj. Lia angle verkita romano *Montara vilaĝo* aperis (1984), en E-versio de William Auld, en la serio Oriento-Okcidento de UEA.

Mirko ZLATKOVIĆ (1941-1998), delegito en Lapovo (Jugoslavio) kaj fakdelegito pri handikapuloj, mortis la 2-an de julio.

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependery@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice,

Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.



LA RADIKOJ DE EVOLUO



La kulturo de ĉiu popolo estas intime ligita al ĝia evoluo. Lastatempe tiu ligo rompiĝis, precipe en evolulandoj, pro adopto de la okcidenta evolumodelo kaj internaciigo de la okcidenta evolumodelo. La aŭtoro de tiu ĉi Unesko-studo – klerulo kaj eksdiplomato el Trinidado kaj Tobago – tamen montras kiel ankaŭ nun eblas utiligi la tradiciojn de la popolo por ĝia evoluo.

“Evoluo povas prosperi nur se ĝi havas radikojn en la kulturo kaj tradicio de la koncerna lando.” (p.15)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21cm. Prezo: 6,80.

Belega glumarko

kun la simbolo de nia sekva kongreso, la impona Brandenburga Pordego, aperis jam en la Montpeliera UK kaj fureore vendiĝis. Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ

Berlino. Mendebila ĉe la Libroservo de UEA:

2,70 po unu folio de 24. Triona rabato ekde 3 folioj.



SOMERO EN BIENO “NJEGUS” (HR)

- 02-09.07. Kurso de la kroata lingvo *kun G. Jurina*
- 11-18.07. Kursa Semajno *kun Spomenka Štimec*
- 17-18.07. Interregiona kaj najbarlanda renkonteto
- 23-30.07. Ne tre konataj aspektoj de Esperanto kaj Zamenhof *kun d-ro Heiner Eichner*
- 03-09.08. Zagorje la verda aŭ *Survoje al la 55-a IJK*
- 10-15.08. Literatura kurso *kun Spomenka Štimec*
- 16-22.08. La plej aktualaj temoj de astronomio *kun d-ro H.M. Maitzen kaj Maja Tišljar*

Orbis Pictus de Višnja Branković – Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, Italio; ☎/✉ 040 767 875; ✉ orbispictus@iol.it



Sepa Internacia Turisma Semajno En Malto

de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1999

Prospektoj kaj aligiloj haveblaj ĉe:

Malta Esperanto-Societo,
P.O. Box 142, Valletta CMR 01, MALTA
✉ maltaesp@global.net.mt

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ.

Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: 10,90 eŭroj.

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la homrajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.

HOMAJ RAJTOJ

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ
de Leah Levin
Ilustrita de Plantu



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Rikolto de 50 jaroj

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindeko de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis versajne centojn da librorencenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)



**La libro estas aranĝita en kvar sekcioj:
Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo.
Tre bela grafika prezento.**

PAJLEJOJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld.
Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 19,05.

Trinku ankaŭ vi el la akvoj de nia Fonto

Unu el la plej riĉaj libro-katalogoj estas tiu de Fonto. Pli ol 80 libroj, originalaj aŭ tradukitaj, bone, bele kaj kompetente eldonitaj, plus 18 jarkolektoj de la monata beletra revuo FONTO. Prestiĝaj verkoj kiel Rikolto, La Luzidoj, Sed nur fragmento, Cent jaroj da soleco, Antologio Latina... kaj la furorantaj verkoj Lasu min paroli plu, Ili kaptis Elzan, Gerda malaperis, Vere aŭ fantazie, de Claude Piron, kaj multaj aliaj, troviĝas en tiu katalogo, senpage livebla de



Brazila Esperanto-Ligo

Ekskluziva distribuanto de Fonto

Caixa Postal 03625
70084-970 Brasília-DF
Brazilo
Fakso: 55 061 226 4446
Telefonnumero: 55 061 226 1248
bel@esperanto.org.br

Specialaj kondiĉoj por
libroservoj kaj
ceteraj revendistoj

Por senpage ricevi la katalogon, bonvolu sendi vian poŝtan aŭ retadreson.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŜTAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŜTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1999 **KŜTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1999

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	40 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2400 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	31 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	33000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

SIMPLE LA PLEJ BONA!

**SESA ELDONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO**



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 10,90.
Sonkasedo: 5,45. Triona rabato ekde 3 ekz.